


NOVA NOMSYSTEMO POR LINGVIKO

laŭ la projektaro de
Manuel Halvelik



kun enkonduko pri
Kontrasta Triaksismo

Parto 1 - Teorio

Serio Universala Esperanto

● n°9 ●

Unua Versio 1992

A new arrangement of linguistic branches and concepts

A new method of parsing on all levels.

according to a new theory

A new terminography for language genealogy

**A new nomenclature, expressed in a new language :
Universal Esperanto**

**A new quantification procedure for
characterizing languages**



Nova distribuo de lingvistikaj branĉoj kaj konceptoj

Nova gramatika analizado sur ĉiuj niveloj.

konforme al nova teorio

Nova terminografio por lingva geneologio

Nova nomenklature esprimita en nova lingvo :

Universala Esperanto

Nova kvantiga procedo por karakterizi lingvojn

*Ce qui se conçoit bien,
s'énonce bien.*

*Klare konceptita,
estas klare eksponita.*

Nicolas BOILEAU

Ĉiuj novaj terminoj en tiu ĉi
verkaĵo estas faritaj
surbaze de la porsciencia
TERMINOLOGIA ŜLOSILO
de
UNIVERSALA ESPERANTO

kun

[Tradiciaj terminoj inter rektaj krampoj]
< Nacilingvaj terminoj inter oblikvaj krampoj >
(Kromnomoj inter rondaj krampoj)

Louis PASTEUR

*Un peu de science
éloigne de Dieu,
mais beaucoup de science
y ramène.*

*Iom da scienco
forigas de Dio,
sed multe da scienco
tien rekondukas.*

INDEKSO

1.	SITUIGO DE LINGVISTIKO	5
2	AL LA ESTONTECO	
2.1	Pripalpaj periodoj de Lingvistiko	7
2.2	Strukturismo	8
2.3	Kondutismo	8
2.4	Transform-Generadismo	10
2.5	Kontrasta Triaksismo	12
2.6	Konsekvencoj por Tipologio	14
3.	AL LA ESTINTECO	
3.1	La Turo de Babel	19
3.2	La Hindeŭropa Lingvo	20
3.3	Genealogio de Hindeŭropidaj Lingvoj	22
4.	ORIGINO DE LA HOMA LINGVO	
4.1	Mita Deveno aŭ Evolua Deveno?	23
4.2	Metapsika Deveno	24
4.3	Ekesto de Lingvo en la Sulko de Origina Peko	25
5.	LINGVOFILOZOFIO (Rilatoj inter penso, vorto, kaj objekto)	31
6.	KIAL NOVA NOMENKLATURO PRI LINGVISTIKO?	
6.1	Pravigo de Terminologia Reformo	35
6.2	Kiun Lingvon uzi por Scienca Terminografio?	37
6.3	La Nomenklature de Lingvistiko kiel Test-Kazo	39
6.4	Postkonsideroj	41
7	<u>NE-INTERNACIA LOGIKECO KONTRAŬ NE-LOGIKA INTERNACIECO</u>	
7.1	NOVA NOMSISTEMO POR LINGVA TAKCONOMIKO	45
7.2	DIGMOGLOTIKA INDICADO (Kvantigo de Lingvotipoj)	47
7.3	LA U.D.K.-METODO	
7.3.1	Superrigardo	51
7.3.2	Nombrizada Nivelo	52
7.3.3	Leksala Nivelo	52
7.3.4	Tagmala Nivelo	54
7.3.5	Takcalaj Markiloj	56
7.3.6	Konkludo	57
7.3.7	Modeloj	58
7.4	ARBOSTRUKTURO DE LINGVIKAJ (SUB)FAKOJ	67
7.5	NOVA VORTARO KUN DIFINOJ	73
7.6	TERMINOLOGIKA ŜLOSILO (selekto)	245
7.7	TRADICIA TERMINARO	251

1. SITUIGO DE LINGVISTIKO

de terminoj kaj difinoj

En tiu ĉi kompilaĵo la vorto "lingvistiko" koncernas la sciencan esplorado kaj priskribado de ĉiuj lingvoj ajnspecaj, kun la specifa celo atingi plejble ĝeneralan teorion per serĉado de trajtoj komunaj al la amasego de kelkmil idiomoj tra la mondo: la universaloj. Mi kaptas la okazon, kiel diletanto (ĉu fikuraĝe?), ekponi proprajn ideojn pri lingvistiko, prepare al specifaj novaj proponoj, unuavice propono pri reformo de ties nomenklaturado. Klaraj konceptoj ja estas antaŭkondiĉo por klaraj envortigoj, kaj klaraj konceptoj siavice dependas de klare konstruita hierarĥia kadro ĝenerala.

Tiel kiel okazis en ĉiuj sciencoj, ankaŭ en tiu ĉi disciplino la metodoj kaj celoj kreskis kaj preciziĝis nur iom post iom, tra centoj da jaroj kaj pro penado de multaj homoj. Kaj ankaŭ kiel en ĉiuj sciencoj, oni rajtas postuli de lingvistiko ke ĝi estu plejble kompleta, plejble ekzakta, kaj provizu kadron en kiu plejble multaj observeblaj faktoj trovas racian lokon.

En praktiko tio rezultis en senĉesa luktado inter malnovaj teoriaj vidmanieroj kaj nove malkovritaj aspektoj, ĉu pro rekonsidero pri iu jam konata lingvo, pro ekzamenado de iu ankoraŭ ne konata lingvo, aŭ pro elmergiĝo de pliaj strukturaj interrilatoj. Normale tiu daŭra interagado devas konduki al ĉiam pli rafinita kaj abstrakta aksiomaro, aplikebla al ĉiam pli multaj kaj diversaj detaloj. Parafrazante REICHLING: "Ĉiu aparta lingvo estas enformigo de "la" lingvo, kaj bona kompreno pri pliaj lingvoj kun trenas bonan komprenon pri la naturo de la lingvo." Estas feliĉige por ni esperantistoj, ke la atento de fakuloj komencas, eĉ se nur *hezite*, direkti sin aktuale ankaŭ al planlingvoj, kie antaŭe nur "naturaj lingvoj" meritis tiun profesulan atenton. margene

Oni ankoraŭ kutimas diri ke, ĝis kiam nepre ĉiuj eblaj lingvoj kaj ĉiuj eblaj lingvospecoj estos elĉerpe pristuditaj, la idealo de "kompleta teorio" pri lingvoj ne estos atingita. Efektive, la sinsekvaj ĝeneraligaj modeloj, kreitaj tra jarcentoj, kiel mi skizos ilin en la sekva ĉapitro, ŝajnas tion pruvi. Sed mi opinias, ke la alvelata haveno jam estas videbla, kaj mi provos per propra plia enkadrigo proksimigi eĉ la albordiĝan kajon. Oni tamen konsciu, ke **absoluta** valideco de ia "paradigmo" (aksiomaro) en ĉiu ajn scienco estas nepre ne realigebla en tiu ĉi relativeca spacotempa universo, ĉar ja ankaŭ ĝi ne eviteble troviĝas sub la jugo de nur staticike probable certeco. Eĉ kiam, kaj se, oni estos analizinta ĉiujn troveblajn lingvojn en tute "kompleta" maniero, ankoraŭ tiamdo neniu lingvisto povos esti fakte certa, ke oni enkalkulis nepre ĉiujn detalojn kaj rilatojn, aŭ ke ne iam en la fora pasinteco ekzistis lingvo iel malkonforma (parte aŭ tute) al la establitaj reguloj, aŭ ke tia malkonforma lingvo en principo ne eblus!

Ni do estu kontentaj iam atingi kulminan fazon en lingvistikaj esploroj, preter kiu la ekzamenado de pluj detalaj kaj plua fajngado de la "universala kadro" estiĝos eble teda tasko, kontribuonta apenaŭ ion vere novan.

La plej elstara komunikilo [inter homoj], kiel mi jam ĝistede ripetis, estas la ordinara lingvo. Sed kultur-sociologoj demonstras, ke "lingvoj troviĝas sur sia finvojo". Homoj parolas ĉiam malpli [senchave], kaj precipe: ĉiam malpli bone. Aktuale ni spertas iun "lingvokrizon"; la tradicia lingvo plu ne kapablas servi kiel [efika] transportilo de sciencaj mesaĝoj kaj ĝi postlumas ĉiujn novajn fabrikaĵojn per kiu la moderna homo ekipas sian vivon kaj kiujn li ofte povas nomi nur per [ĝargonaj] mallongigoj. Kiel tion formulis (la hispana filozofa) Ortega y Gasset, la aferoj, per kiu la moderna ^{homoj} vidas sin ĉirkaŭita, ŝanĝiĝas tiel rapide ke la malnova kvazaŭmagia [aŭtomata] asociigo inter vorto kaj objekto hodiaŭ plu ne estas realigebla. Ni eĉ forte sturmas al kontraŭa ekstremo. La realeco, kiu trudas sin al la moderna homo, eskapas laŭ du direktoj al lingva regado. Por la [grandnombra] fakularo la [ĝisnuna] lingvouzo fariĝis maltaŭga [komunikada] instrumento -- kaj samokaze por la ordinara laikaro ĝi fariĝis tro abstrakta, tro malforte ligita al praktikaj lertecoj kaj al manipulado de ĉiuj tiuj helprimedoj en la ĉiutaga vivo, kiu tute forpuŝas la naturon kiel kadron por la homa vivo. [.../...] Estas nepenseble, ke la kutima parolata aŭ skribata lingvo tute formortos. Sed ĉiel ajn ni frontas [la bezonon pri] radikala reformo, kiu igu ĝin pli adaptiĝema kaj moviĝema, pli konformiĝema al la postuloj de la aktuala vivo. Al mi ŝajnas, ke ni estas mallernantaj la arton de efika parolado. Tamen, mi volas esperi ke ni estas survoje al pli dezirinda situacio -- al nova, pli senpera lingvaĵo, pli firme ligita al la objektoj mem, pli efika kaj elasta.

(Profesoro Jose ARANGUREN en *Human Communication*)

2. AL LA ESTONTECO

2.1 Pripalpaj periodoj de lingvistiko

Tute scienca analizado de la fenomeno "lingvo" — se flankelasi eventualajn ĉinajn esplorojn, pri kiuj mi nenion scias — okazis unuafoje verŝajne en la 4^a jarcento AD, fare de PAANNINI en Hindujo, rilate al Sanskrito. Tiu geniulo, laŭ mia scio do kiel unua, ekkonis la neceson determini baz-elementojn en la lingvo, kaj sur tiuj bazaj elementoj konstruadi supren, paŝon post paŝo.

En Helenujo oni poste filozofadis precipe pri la rilatoj inter nur pensosimboliga vorto kaj reale ekzistanta objekto, inter *tipo* kaj *signo* — kiu delikata temo okupas saĝumantojn kaj saĝumistojn ĝis hodiaŭ, kaj al kiu temo mi revenos en ĉapitro 5. Al la filozofo ARISTOTELES ni ŝuldas unuajn klasifadojn laŭ vortspecoj, gramatikaj seksoj, kaj deklinacioj.

La Romianoj dume okupiĝis nur pri la skriba formo de sia lingvo, cele al instruado kaj unuecigado, do pri purpraktika aplikado de Latino, ĉar tiu ĉi komunikilo tro rapide disdialektiĝis en la bunte vastega Romia Imperio.

Pro la unuaranga graveco de Latino, kiel komprenigilo intergenta kaj interklerulara, eĉ post disfalo de tiu antikva imperio, ankaŭ la eŭropa Mezepoko okupis sin sur lingva tereno nur pri praktikado kaj komento de antikvaj beletraj aŭtoroj. Kaj tiu pragmatisma konservemo markis eĉ la Renesancan Epokon.

Feliĉe, la komenciĝanta intereso por ŝemidaj lingvoj, nepre sciendaj por pli profunde kompreni bibliajn tekstojn, kaj por ekkoni (aliforme perditajn) verkaĵojn de aŭtoritataj helenuloj, konsciigis lingvistojn pri la ekzisto de parencecoj inter la "klasikaj" lingvoj.

Unu el la pioniroj sur tiu kampo estis la germana matematikisto LEIBNIZ (17^a jarcento), kiu verkis tutan teorion pri la parenceco inter multaj lingvoj kaj lingvogrupoj. En lia sulko komencis aperadi komparaj vortlistoj pri dekoj kaj dekoj da lingvoj.

kromaj

2.2 Strukturismo

Dum ke la 18^a jarcento konsideris, por komparaj celoj, nur la koncernan vortmaterialon, kiu ja ŝajnis unuavide la sola bazo por esplorado, la 19^a ekkonis ke tio ne sufiĉas, sed ke oni nepre devas enkalkuli ankaŭ la regulojn kiuj regas la uzadon de vortoj, alidire la gramatikon de koncernaj lingvoj. Kaj

ankaŭ la iom-post-ioma ŝanĝiĝado de lingvo-mekanismoj tra la jaroj, trudis sin kiel grava faktoro por esplori ankaŭ evoluon de lingvomaterialo.

Elstaran mejloŝtonon en tiu direkto liveris William JONES, per sia malkovro en 1786, ke pliparto el la ĝis tiam pristudataj "okcidentaj" lingvoj parenkas eĉ al la malnova "morta" lingvo de Hindujo, nome al Sanskrito. Ekde tiam la komparadoj povis okazi en la vasta kadro de tn. **hindeŭropidaj lingvoj**, kaj la sciencistoj ankaŭ ekkonsciis la superan gravecon de parolaj lingvoformoj (prononcado), precipe la transformiĝoj en la fonemoj — kompare al nur skribaj formoj (ortografio) de lingvoj. Konataj pioniroj por tio estis unue la famaj germanaj fabelverkistoj, la fratoj GRIMM, kaj ilia samgentano la filozofo n. VON HUMBOLDT, al kiu lasta ni ŝuldas la unuan **lingvotipigan skemon**.

Nia propra 20^a jarcento produktis la svison F. DE SAUSSURE¹ kiu instruis la (hilemorfisman) distingon inter konkreta formo ekstera *parole* ("lingvaĵo") kaj abstrakta esenco interna *langage* ("lingveco"). Krom tio li demonstris la neceson ekzameni lingvojn ĉiam laŭ du reciproke komplementaj dimensioj: unue laŭ aktualaj formo kaj funkciado — kion li nomis "sinkrona lingvostudo" — kaj due laŭ historie antaŭaj formo kaj funkciado — kion li nomis "diakrona lingvostudo". Kaj trie, laŭ tiu sama sulko, li instruis analizadan apartigon inter la "horizontalaj" rilatoj sintagmaj kaj la "vertikalaj" rilatoj paradigmaj. Li certe ne inventis tiujn vojojn, sed ja klare kaj firme enformuligis ion, kio ĝis tiam estis sekvata pli-malpli hazarde, laŭ modotendenco aŭ privat-elekta intereso. Estis la kulmina epoko de **Strukturismo**, la unua modernscienca laborhipotezo por studi lingvojn, kiu decide metis emfazon sur plejebla vastan ĝeneraligon de sintaksaj fenomenoj, kiel universale validan trajton. Almenaŭ kiom koncernas "naturajn" lingvojn.

2.3 Kondutismo

Tamen, obee al la fama socikultura principo de HEGEL pri ĉiama sinsekvo de tezo → antitezo → sintezo, aplikebla kaj aplikenda al ĉia evoluada procezo, estiĝis poste skolo de malkonsentantoj pri universala valideco de la strukturisma laborhipotezo. Estas ne mirige, ke tiu kontraŭstaro naskiĝis en Usono, ĉar ĝuste tie uzatas indianaj lingvotipoj, kiuj **ŝajne** ne kongruas kun strukturisma vidmaniero.

Kiom mi povas diletante prijuĝi la situacion, tiu malkonsento rezultis precipe el la fakto, ke la koncepto "vorto" — tute centra en strukturismo — ŝajnas perdi en tiuj lingvoj sian signifon kiel fundamenta konstruero, kaj estas akompanata de diverĝaj sintaksaj mekanismoj por formi frazojn. En la klasikaj hindeŭropidaj lingvoformoj oni ja ĉiam kapablas sufiĉe facile apartigi "radikojn.

1: Frato de René DE SAUSSURE, profesoro pri matematikoj, kiu iĝis esperantisto kaj bonkonatas pro sia scienca analizo de la "gramatika karaktero" de Esperanto-radikoj.

morfemojn, kaj afiksojn", eĉ se tiuj pro prononcaj leĝoj ofte kunfandiĝas en (supraĵe) plu ne diserigeblaj tutaj. Ekzemple, en nia Esperanta vorto *konsekvenco* oni povas, surbaze de ties latina origino, facile rekoni la centran radikon *sekv'*, ĉar ĝi ankoraŭ bone montras "kapon kaj voston". Sed jam en la gaela (kelta) lingvo la supere grava komenca parto de vortoj ofte forfalas, aŭ aliĝas ĝis nereconebleco, tielke fariĝas malfacila tasko en ĝi alfabete ordigi vortojn. Ekzemple *pen* ("kapo") iĝas *ben*, *mhen*, *fen*, laŭ tio ĉu ĝin determinas respektive la pronomoj "lia, mia, ŝia". Rigoraj reguloj por regi tiun fenomenon, kiun gaeloj nomas "mutacio", apenaŭ ekzistas. Tio iĝas ĉi tiun lingvon malfacile mastrebla.

Nu, en la nordamerikaj indiĝenaj lingvoj malaperas aŭ "mutacias" ne nur la antaŭa parto, sed ankaŭ la malantaŭa, tiele ke fariĝas tre embarase selekti kaj rekoni la ĝustan "neŭtralan" vortformon bazan, de kiu oni derivu ceterajn formojn. Vortradikoj en ĝi povas ekstrem-kaze reduktiĝi al nura silabo aŭ eĉ al konsonantgrupo. Tiel, pri (suplementaj) sufiksoj kaj (gramatikaj) finaĵoj plu neniel povas esti argumento.² Sed ĉu tio signifas ke la strukturisma koncepto ne validas universale - Miaopinie la fleksia rimedaro tie ĉi nur reduktiĝas al nulo, sed - por ĉiu ago estas pago - tiun mankon devas kompensi ekstrema organizado de prepozicioj kaj fajngidon de ilia rolo. Kaj efektive tiel okazas.

Krom tio, la klasikaj vortspecoj en ili kutimas kunfandiĝi, tiel ke la nocioj "vorto" kaj "sintagmo", kaj eĉ "frazo" iĝas identaj. Sekve, ankaŭ la determinado de gramatika vort-kategorio en ili iĝas konfuza afero. Estas kvazaŭ en Esperanto oni reduktus ĉiufoje, al nur unu simpla vorto, kunmetitajn nociojn kiel ekz. estus *sonbeldiri*, *fruprintempmatena*, *noktpostmezo* - ja pro manko de taŭgaj determinantoj (primariaj) ankaŭ interpreteblaj kiel *dirbelsona*, *matenprintempruo*, *meznoktposte*, kotopo. Kaj, por kroni la tuton, la sinsekvigo de tiaj "vortoj" en frazo estas tiel komplikita, ke necesas fakte parkeri preskaŭ ĉiujn kombinaĵojn kiel tiom da fiks-esprimoj apartaj.

Ni tial ne miru ke, ĝis hodiaŭ, la klasifado kaj interparencigado de indianaj lingvoj restas delikata kaj kompleksega entrepreno. Aliflanke, ni konfesu ke efektive la strukturisma principaro, tiel bonrezulte aplikebla al hindeŭropidaj lingvoj, apenaŭ funkcias en la konkretaj situacioj de indianaj lingvoj.

Ĉiuj tiuj lingvoteknikaj obstakloj do erare igis la usonan skolon de BLOOMFIELD (1887-1949) malakcepti la validecon de strukturismaj principoj, kaj

2: Per tiu trajto la kelta(j) lingvo(j) pensigas pri Indianaj lingvoj. Mi tial kuraĝas sugesti ke ambaŭ "aloj" estas idoj de la iama lingvo de la mita lando Atlantis - miaopinie ne vere unubloka kontinento, sed ja arkipelago kia ekz. Japanujo aŭ la Filipinoj, malaperinta pro katastrofaj geologiaj (mal)leviĝoj meze en nuna Atlantika Oceano, antaŭ pli ol 10000 jaroj. La orienta alo de tiu lingvo(grupo) restis "arkaika" kaj moderna en tiu trajto, eventuale pro pli rafinita (=organizita) civilizo, dum la okcidenta alo, disfalinta en multajn relative izolitajn tribojn, evoluigis la trajton ĝis-ekstreme.

studadi lingvojn sen determinita metoda aparato, dekretante ke abstrakte internaj procezoj en realo ne ekzistas en la homa lingvo, sed estas nur elpensitaĵoj. Ĉiu serĉado de "universaloj" laŭ ili estus sekve vana klopodo.

Ankoraŭ pli grava motivo por tiu ilia malakcepto tamen estis de mondpercepta, se ne diri religia, naturo. En la sulko de kondutismo [angle: *behaviorism* = teorio pri psikologio kaj bestaj reagoj], usonaj sciencistoj kaj filozofoj ja ege malŝatis la ideon pri ebla ekzisto de iu nemateria grundo kaj tialo malantaŭ naturaj fenomenoj, kaj pro tio ili senskrupule malagnoskis ankaŭ abstraktajn substrukturojn en la lingvofenomeno, kiuj eventuale povus konduki al abomena konkludo pri ekzisto de iu spirita nivelo en la homo. La koncerna lingvoskolo tial ne hezitis revivigi la jam arkaikan pozitivismon-materialismon de la antaŭa jarcento, kvankam (precipe) la fizikaj teorioj de relativeco kaj kvantumfiziko tiujn fakte mortbatas. Oni do prave aplikas al tiu sinapartigita skolo ankaŭ la epiteton "mekanikismo", same laŭ lingvoteknikaj kiel laŭ filozofiaj kriterioj.

2.4 Generadismo

Tiu memkreita blindeco preskaŭ fatale kondukis koncernajn lingvistojn en sakstrateton, kvankam ili sukcesis plu sekvi sian erarvojon ĝis en la kvindekaj jaroj de nia jarcento. Sed tiam la konsiderado de nurnure morfologiaj kaj fonologiaj elementoj — kiel "sole percepteblaj trajtoj de lingvo" — sen atento por sintaksaj rilatoj kaj eĉ malpli por semantikaj fenomenoj, kiuj ja same forte determinas la uzadon kaj evoluadon de lingvoj, fine elvokis gravajn protestojn.

Ja, eĉ plejeble grandaj kompleksigo kaj kripligo en la formado de vortoj-sintagmoj-frazoj ne povas malhelpi aŭ kaŝi, ke ili obeas iun regularon, kaj aranĝiĝas laŭ iu metodo. Aliel ne povus esti parolate pri lingvokodo per kiu homoj interkomunikas; ĉiu membro de koncerna gento tiamdo uzus tute propran esprimadon, kompreneblan de neniu alia gentano. Precipe: se oni ne aplikas iun morfologian rimedon por distingi inter subjekto, predikato, kaj objekto, tiamdo oni devas — kaj tiel okazas — apliki alian rimedon, nome donaci al ekz. la objekto (aŭ koncerna adjekto) iun konvencian vorteton akompanan (sintagma solvo) aŭ minimume meti la frazopartojn en tute rigora sinsekvo kaj peze apogi sin sur la kunteksto, por eviti dubsencecon.

Ĉiel ajn, la absolute bazaj konceptoj S-V-O, nepre devas aperi en la cerboj de parolanto kaj aŭskultanto — reale aŭ per subkompreno, ajne per kiu morfologia formo, per kiu sintagma aranĝo, aŭ per kiu tonmodulado. Aserti ke la klasikaj konceptoj ne universalas, estas do plu ne vidi la arbaron pro la multaj strangaj arboj ...

Brila pioniro de la nova vojŝanĝo — pli ĝuste de kompleta returniro al strukturismo en lingvistika teorumado, post la Dua Mondmilito — estis Noam

CHOMSKY, kiu komencis fosadi eĉ pli profunden ol iam ajn antaŭe. Lia opinio, homoj konkretigas sian lingvon ĉiam surbaze de enigmaj antaŭ-ekzistantaj mensaj strukturoj, egalaj por ĉiuj, sed konkretigeblaj per senfina nombro da manieroj, jen pro propra inventemo, jen pro instigoj el la ekstera mondo. Tiun principon li ne nur proponis, sed firmigis ellaborante ĝeneralajn sintaksajn konstru-formulojn, alidire algoritmojn, kiuj klare montras la sinsekvajn ŝtupojn kaj disbranĉiĝojn, laŭ kiuj vortoj kaj frazoj (trans)formiĝas kaj interligiĝas. Pro tio, oni parolas ja pri transformismo aŭ generadismo.

Hodiaŭ, tiu matematikeca diserigado de frazoj aŭ muntado de elementoj, kio speguliĝas en tn. "arbostrukturoj", trovas intensan aplikadon en informadiko, precipe en kreado de aŭtomataj aŭ duonaŭtomataj tradukprogramoj.³ Laŭ mi plej interesa tamen estas la atento kiun aktualaj lingvistoj dediĉas ankaŭ al pure **semantikaj** fenomenoj; tio estas al signifo-ŝanĝiĝoj, kiuj okazas nek per strikte morfologiaj (vortformaj) rimedoj, nek per sintaksaj (vortkombinaĵaj) rimedoj, sed per la kunteksto en kiu la vortoj/esprimoj aperas.

Banala eldiro, kia estas ekzemple "Tie troviĝas la pordo", ja povas akiri tute malsaman signifon laŭ tio, ĉu ĝin prononcas: arkitekto klarigante aranĝon de domo, kolera patro forpelanta malŝatatan bofilon, enkarcerigito serĉante eskapon el sia prizono, kruda spritulo montranta al sia postaĵo, kotopo. Al tiu ĉi kategorio de lingvofenomenoj oni povas alnombri, ĉu marĝene ĉu partoprene, ankaŭ tn. "lingvonivelojn" (faklingvaĵo, dialekto, slango, arkaika lingvaĵo), kiuj same modifas signifojn per ne tuje "klasikaj" lingvorimedoj.⁴

Tamen, al tiuj ĉi semantikaĵoj ankoraŭ mankas en lingvistiko — laŭ mia filistra opinio — propra formala hejmo, kiu servu kiel bazo por plejeble metoda pristudado, laŭ la modelo de jam enkalkulitaj diakroneco kaj sinkroneco. Por tian hejmon realigi, mi aŭdacas proponi al profesiuloj la ĉi-postan skemon, pli vastan kaj kompletan, konsidereblan eventuale kiel novan hipotezon, se ne kiel efektivan teorion...

3: Mia eseo pri «Tutaŭtomata Tekstanalizado», en *Akademias Studoj* 1985 [Eld. Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado K0L 1R0] provas por tiu celo enkonduki novan algoritmaron "kognitivan", por ke la programo memstare decidu pri kio temas la teksto analizata.

4: Legu en mia «Serio Universala Esperanto» la traktaĵojn pri respektive: *Arkaika Esperanto, la verda Pralingvo* [SUE-4], *Popido, la verda Dialekto* [SUE-3], kaj *Gavaro, la verda Slango* [SUE-5].

2.5 Kontrasta Triaksismo


En *Akademias Studoj* 1987 [pp. 22-25] mi starigis la bazan hipotezon ke:

Nia Universo posedas geometrian strukturon dinamikan, konsistantan el tri diskoformaj ebenaĵoj, perpendiklaĵoj unu al la aliaj. Iliaj interkruciĝoj naskas la konatajn tri spacajn aksojn. Unu el la tri ebenaĵoj krome rotaciadas kaj etendiĝadas, kuntrenante la tutan sistemon per lumrapido: la tempo-spiralo. Tiu interna "anatomio" de la Universo retroveblas en la fundo de ĉiuj organizitaj fenomenoj" [ajne ĉu fizikaj, sociaj, au psikologiaj].

Jena kosme fundamenta, kaj fakte metafizika, skeleto manifestas sin do ankaŭ en ĉiuj **lingvofenomenoj**, indiferece sur kiu nivelo: en fonetiko, fonologio, morfologio, sintakso kaj — plej interese — en semantiko. Pro tio mi kreis la terminon "Triaksismo". Kielmaniere? Tiel, ke oni povas rimarki en ĉiu lingvonivelo tri "direktojn", kiuj permesas plej racie organizi la koncernajn elementojn, aŭ pli ĝuste: permesas kompreni kiel ili mem nature sin organizas. En la skemo de n. DE SAUSSURE klare elstaris jam du tiaj dinamikaj direktoj, kiujn ni nun povas identigi kun la du reciproke perpendikle agantaj spacnaturaj aksoj: X (aglutina) kaj Y (fleksia). Mankis nur la tria akso Z kiu, ĝuste pro sia tempa naturo, ne tiel facile kaj senpere montras rekoneblajn formojn. Estu ĝi la moviĝodirekto de semantiko — okaze nomebla "parataksa" — kiu finfine kaj trans esprimado de ironio kaj de pens-asociigoj ĉiuspecaj, manifestiĝas kiel ... la ĉiodetermina, plej grava lingvofaktoro el ĉiuj; ja tiu de la "kunteksto".

Sed, ĉar ja temas ankaŭ pri moviĝadoj, ni devas aldoni ke ŝanĝiĝoj okazas sur la tri aksoj jen "pozitive", jen "negative", el kiu dinamiko naskiĝas la fenomeno de oponoj, alidire de kontrastoj; ekzemple en fonologio tiu de la konata "minimuma paro". Pro tio la koncernaj terminoj kaj nocio kompletigu al **"Kontrasta Triaksismo"**.

En semantiko oni povas kompreni tiun kontraston, ekzemple kiel plivastigon de nocio (metaforo) kompare al malvastigo de nocio (metonimio). Sed, en ĉiu oponado de elementoj, do en ilia interagado, necesas distingi la agadon mem kiel memstaran principon, sen kiu la kontrastantoj ja noumene povus ekzisti, sed nenion ajn fari; certe ne estigi iun "sistemon". Tiu agado mem respondas al la ĝenerala koncepto "katalizilo", manifestiĝanta en lingvistiko kiel "predikato" (plej ĝeneralsence). Estus kompreneble granda avantaĝo por lingvotipigo kvantigi tiujn aksojn, tiele ke oni povas determini en ili tri la (pocentan) proporciojn: kaj tion mi efektive proponas en ĉapitro 7.2 ("Digmoglotika Indicado"), suplemente al jam ekzistanta procedo.



KONTRASTAJ AKSOJ EN LINGVISTIKO

Mi pensas, ke la sama metafizika skeleto rolas en ekz. komputoriko. Ĝis antaŭ nelonge oni planis aparatojn kaj programojn laŭ la principo de VON NEUMANN (pri sinsekvado de algoritmaj ŝtupoj), kiu rilatas sole al la horizontala akso. Freŝdate oni tamen komencas dediĉi plenan atenton ankaŭ al "paralelaj" instalaĵoj kaj procedoj, kiuj rilatas fakte al la vertikala akso. En mia eseo pri «Tutaŭtomata Tekstanalizado» — iom troiga titolo — proponatas ĝuste tianatura algoritmaro: unuflanke por distingi subjekton-predikaton-objekton en propozicio (alsuba direkto), kaj aliflanke por ekkoni la **temon** de koncerna teksto (alsupra direkto): la "vinjeta algoritmo". Sed plena kaj kompleta ellaboro fine postulos aldonon de ankaŭ la tria akso (sagitala), kiu ŝajnas jam ekzisti kaj funkcii en la homa cerbo, per profundeco-tavoloj de la kortekso, kaj kiu en komputoriko kredeble prenis la formon de pens-asociligaj datenbankoj.

Nu, en tiu universala lingvistika kadro — ĉu la sciencistoj ŝatos aŭ ne ŝatos tian aŭdacan trableĉon de la materialisma pensokamizolo "ekzakt-sciencia" — centras la kristanisma dogmo pri Tripersona Dio, kiu sin manifestas ankaŭ en la kreita Universo, ĉiam per triopo da interagantaj principoj, sekve en frazarangado per la triopo subjekto-predikato-objekto. Trans tiu analiza sojlo oni kompreneble plu ne traktos lingvistikon, sed metafizikon, kaj fine ... teologion.

Estas tial mia konvinko, ke oni ne kapablos trovi ankoraŭ pli fundamentan nivelon por generi frazojn, spite la buntan amason da supraĵnivelaĵoj kaj kompleksiĝoj, en kiu sin reale esprimas la homa pensado. Cetere: nek paradigma, nek sintagma, nek eĉ la jen proponata "parataksa" lingvoanalizado, povas havigi koheran sistemon sen antaŭa ellaboro de ĉiam pli ampleksaj hipotezoj. Nu, mia hipotezo estas tiom vast-ampleksa, ke ĝi forpuŝas eĉ la limojn de lingvistiko strikte. Iel eĉ duoble, ne nur ĉar ĝi konsideras metafizikajn elementojn, sed ĉar ĝi egalrajte kaj senrezerve etendiĝas al plan-

lingvoj — ja eĉ esprimas sin per unu el tiuj — Antaŭjuĝo ne malofte estas misjuĝo ...

2.6 Konsekvencoj por Tipologio

La skeleto de Kontrasta Triaksismo estas, kiel jam tuŝite en 2.4, aplikebla kaj aplikinda al ĉiuj lingvoniveloj kaj lingvotipoj.

En **Fonologio** oni trovas horizontalan kontraston inter konsonantoj kaj vokaloj, vertikalan kontraston jen inter senvoĉaj kaj voĉhavaj konsonantoj / jen inter fermitaj kaj malfermitaj vokaloj, kaj sagitalan kontraston jen inter emfazata kaj senemfaza fonemoj / jen inter altaj kaj malaltaj tonaltecoj (suprasegmentaj elementoj).

En **Morfologio** oni trovas horizontalan kontraston inter aglutinaj elementoj (sintagmoj), vertikalan kontraston inter fleksiaj elementoj (paradigmoj), kaj sagitalan kontraston inter tropoj (parataksoj).

Tiu ĉi aranĝo etendiĝas al propozicioj inter si. Kaj eĉ en **Frazeologio** (komprenata kiel kombino de propozicioj) oni trovas horizontalecon ĉe konjunkcia ligo, kaj vertikalecon de subjunkcia ligo, dum sagitaleco (interpretado) aperas nevideble per koncerna kunteksto.

Sed, krom la aksojn mem kaj la dinamikajn oponojn sur ili, oni devas konsideri ankoraŭ unu pluan parametron, kiu ege taŭzas kaj konfuzas la lingvistikan bildon, nome la **gradon de reguleco** en formo kaj konduto de koncernaj lingvaj elementoj. La akso-karaktero de tiuj aŭ de aliaj elementoj ja estas en reala situacio ne ĉiam same klare kaj senpere ekkonebla, kaj tio povas konduki al malĝusta interpreto rilate ilian lingvotipigan naturon.

En fonologio, ekzemple, la vertikala kontrasto inter konsonantoj povas ŝoviĝi "supren", tiele ke oni akiras spirblovan senvoĉulon opone al senspiran (ekz. P^H kontraŭ P, anstataŭ P kontraŭ B); aŭ malklara kaj daŭre senemfaza vokalo povas finfine tute malaperi, lasante sian partneron vidva (arkifonemo); aŭ la minimuma paro povas iom post iom kunfandiĝi, kun la sama rezulto.

En morfologio, la distingo inter aglutineco (de radikoj) kaj fleksio (de afiksoj) povas forvaporigi pro tio, ke oni kutimas tradicie rigardi afiksojn (sub influo de latinaj modeloj) apriorie kiel forme malfiksajn elementojn. Kiam ili do montriĝas esti nete fiksformaj (kiel en la turka), oni emas blindigite de la tradicio rigardi ilin kiel aglutinajn elementojn kaj klasifi la koncernan lingvon laŭ tiu tipo. En Esperanto tiu situacio estas eĉ plej erariga, ĉar en ĝi eĉ afiksoj povas (principe!) roli memstare, do samkiel radikoj: *ulo*, *ade*, *eki*. La diferenco inter radikoj kaj afiksoj tamen havas pli profundan karakteron ol nur ilian supraĵ-nivelan formon. Esenca rolo de afiksoj male konsistas en la ofteco de illa uzado, akompane al kaj modifado je radikoj. Ja ĝuste pro tiu mult-uzado okazas iom post iom natura erozio je la juntopunkto de

radikoj/afiksoj, fine rezultanta en ĉiuspecaj misformaĵoj. En tiu kadro ajna radiko povas iom post iom akiri la formon kaj rolon de afikso, kiel demonstras etimologiaj esploroj. Sufiĉe freŝdata ekzemplo estas la terminoj kiujn oni muntis en Usono ekde la siatempe fama modvorto *sputnik*: *beatnik*, *lovenik*, *refusenik*...

Sed eventuale ankaŭ intence, kiel en Esperanto la propono de R. EICHHOLZ, preni la lastan parton de la vorto *lavabo* por indiki higienajn instalaĵojn (*fekabo*, *duŝabo*, ka.). En Esperanto oni povus/devus analoge rigardi ekz. *jarduo*, *jarkvino*, *jardeko*, *jarcento*, *jarmilo*, ne kiel verajn kunmetaĵojn, sed ja kiel estontajn derivaĵojn, kun la numeralo dua membro ĉiufoje aganta kiel fleksia elemento!

Ankaŭ la inverso eblas, almenaŭ en principo, nome ke iu afikso laŭgrade elkreskus al memstara radiko. Efektive stranga aserto; sed plu ne tiel stranga, se ni memoras ke ĉiu lingva elemento, same kiel la lingvo mem, posedas neforigeble en sia naturo la eblecon moviĝi laŭ ajna kontrasta akso. Estas ja dinamika ento. Dependas nur de la cirkonstancoj (sinkrona, diakrona, parakrona) kiun el tiuj teoriaj eblecoj ĝi adoptos konkrete — plejeble de la premo aplikata al ĝi fare de "gramatikaj reguloj", aliel de "analogio" en samklasaĵ elementoj. Se tiu premo montriĝas esti — ĉefe aŭ eksklude — aglutina, oni kompreneble ne rimarkos en ĝi la potencialan trajton pri fleksio aŭ pri "tropifemo". Ni do certe ne lasu erarigi nian juĝon pro strikte morfologiaj faktoroj!

Miaopinie, Esperanto estu tial konsiderata ideale ekvilibra aglutina-fleksia lingvotipo. kaj se/kiam ni estos plenzorge reviziintaj la difinojn en nia kara PIV — precipe kiom koncernas dezirindan polisemantecon kaj forigindan homonimecon — eble ni povos etikedi Esperanton (kaj nur ĝin!) ideale triaksa lingvotipo.⁵

Novaj ideoj estas kiel la mateniĝo. Ili trovas homojn plejparte dormantaj.

(Cyriel VERSCHAEVE)

5: Tiu ĉi enviinda modeleco validas kompreneble nur por ĝia strukturo kaj ĝia baza vortaro, ĉar koncerne la fremdvortan amasegon ĝi estas pli ĝuste "malmodelo".

Ĉu tro aŭdace rekoni en ĝi la "lingvon purigitan" kiun anoncis la hebrea profeto Cefanja [3: 8,9] ? Pliparto el koncernaj bibliotradukoj uzas la adjektivon "pura" en tiu loko, sed ŝajnas ke reale temas pri "purigita" lingvo. Purigita de kio? Nu, eble de ... terminologiaj fiherboj.⁶

Ankaŭ la pure aglutina mekanismo povas evolui de kompleta diseco de la elementoj/vortoj (en plejble regula lingvotipo izola) al ilia plena kunfandiĝo en tielnomata enkorpiĝa/sinteza/holofrasta lingvotipo (foje aŭ sisteme akompanate de plejble malregulaj modifoj en la kunligaj partoj, aŭ eĉ de ties kompleta forviŝo). Sed tio ne malhelpas, ke oni havas aferon en tiu aspekto ĉiam kun strikte horizontale aglutina fenomeno! Neniel necesas do supozi ekziston de iu ekstra, kvara, lingvotipo — kiel faris la disĉiploj de VON HUMBOLDT. Krome, estas laŭ mia modesta opinio ankaŭ neniuj motivoj rifuzi al tiuj ĉi lingvoj fleksian vertikalecon, ĉar iliaj afiksoj — eĉ se reduktitaj al minimumo — tamen tre regule interŝanĝeblas. Kaj la determino, de ekzemple la ĉina, kiel estante "izoltipa" lingvo, miaopinie estas same miselekta. Tio kio plej trafe karakterizu tiun lingvogrupon, estas ne la ekstrema loko kiun ĝi okupas laŭ kriterio de reguleco sur la horizontala akso, sed la fakto ke ĝi funkcias preskaŭ senescepte sur la sagitala akso de stilfiguraj modifoj, do per pure semantika rimedaro! Unu sama frazo en ĝi, kun idente samaj vortoj/ ideogramoj en idente sama sinsekvo, ja povas havi plurajn signifojn — inter si komplete diverĝajn — kiujn malĉifru la malfeliĉa labor-azeno nomata "kunteksto".

Tria kompleksigo kuŝas en la iel **duobla karaktero**, kiun povas havi — laŭ sia propra maniero — la "tropa" dimensio (semantika), per demonstro jen de vertikalaĵaj trajtoj, jen de horizontalaj trajtoj.⁷

Tiuj ambaŭ eble plej klare elstaras en terminologiaj arboskemoj: Vertikaleco per la rilataro genro-specio (hiperonimo/hiponimoj), aŭ eĉ pli simple dirite per la rilato vinjeto (ikono) → termino → difino. Kaj horizontaleco per referen-

6: Pri gematria (te. kabala) interpreto de tiu fama versiklo hebrea, kaj ĝia intima rilato kun la estonteca rolo de Esperanto, indas legi la artikolon de Jeremi GERSHON en *Evangeliaj Kajeroj* n-ro 4 (1988). [Eldonejo Cousson, Le Hameau des Plais, Nou aillé--Maupertuis, F-86340 La Villedieu du Clain, Francujo]. // Sed necesas scii, antaŭ ĉio — kaj povi agnoski — ke la Biblio estas trezorujo kun **duobla** fundo. Trans la homfaritaj tekstoj troviĝas en ĝi ofte — se ne ĉiam —, vualita Di-farita mesaĝo aŭ signifo, kiun oni kompreneble neniam malkovros analizante sole ĝian "surfaco-strukturon". Bedaŭrinde, filologoj kaj ekzegezistoj faras kutime nur tion. Eĉ nia eminenta erudicia, kaj karmemora, Profesoro WARINGHIEN falis en tiun "scienc-ekzaktan" kaptilon ateisman. Ĝuste koncerne la tekston de Cefanja li ja "pruvigis" en «La Profetoj kaj Esperanto», ke tute neniel povas temi pri Esperanto kaj ties destino... [Eseoj: *Beletro* 1]

7: Trafe tion ilustras situacio en la diversaj eblecoj por moduli elektromagnetajn ondojn en radio-elsendado: al la spacaj dimensioj respondas respektive "horizontala" frekvenco-modulado kaj "vertikala" amplitudo-modulado. dum al la tempa dimensio respondas unuflanke laŭfaza (frekvenc-analoga) pulsomodulado — en kiu la daŭro de la pulsoj diferencas. Ceteraj procedoj estas nur varioj aŭ kombinoj de la supraj ĉefaj. [Legu ankaŭ piednoton 5]

coj al iel konektaj konceptoj samnivelaj (sinonimoj), same aperantaj en ĉiu bona klariga vortaro. La realeco kaj daŭra influo de semantika reĝisoro, malantaŭ la lingvaj kulisoj — eĉ malantaŭ generadismaj konstruoj plej profundaj — eble plej bone pruveblas per lingvoludeto konsistanta en la anstataŭigo en iu teksto de ekzistantaj vortoj per tute imagaj. Kvankam la rezultaĵo estas laŭdifine nepre sensenca, la lingve trejnita cerbo tamen insistas detekti en ĝi iun nebule enigman signifon. De la aŭtoro Lewis CARROLL⁸ mi volonte citas la unuan strofon de tiaspeca ŝercpoemeto — donante de ĝi ankaŭ iun provon de "traduko" en Esperanto:

JABBERWOCKY

*T'was brillig, and the slithy toves
Did gyre and gimble in the wabe;
All mimsy were the borogoves,
And the mome raths outgrabe.*

GALIMAROLE

*'Stis lumare, kaj la glistaj klomboj
Vuris kaj miklis en l'uvalo,
Tute pinte doniris la promboj,
Kaj brumiflis ninde l'umbalo.*

La teksto impresas normala, ĉar en ambaŭ lingvoj la enfrazigo bone obeas la respektivajn gramatikajn regulojn, sed ĝi estas reale sen iu ajn signifon. Tamen indas rimarkigi inter parentezoj, ke la supra teksto en principo **povus** havi signifon; nome se temus pri sekreta slango, te. kodlingvo intence ne komprenebla por ne iniciatoj. Brilan modelon pri tia stilo liveras kelkaj poemoj de François VILLON, kiujn oni sukcesis malĉifri nur jarcentojn poste. [Pri-traktita en mia *Arkaika Esperanto*]

Alia venas de la franca komikisto COLUCHE, kiu per ĝi satiris la ofte konfuzajn aŭ fuŝe klarigatajn regulojn de iu nova komercata tabloludo.

La Vratouille

La vratouille se joue à deux, avec une pamoise et un corbeuchin. Celui qui a la pamoise doit essayer d'écluter le corbeuchin de l'adversaire sans faire magreller son corzon, car si le corzon magrèle, il devrouille son rache pied et fait tarquiner la cliette.

Les joueurs changent de pusils après chaque riponard de douze coups.

On y va ?

La Ratufo

La ratufo ludatas duope, kun talemato kaj porguro. Tiu kiu havas la talemato devas provi kelitci la porguron de sia oponanto, sen garlimigi ties snorton, ĉar se la snorto garlimas, ĝi mekravas lian grutabason kaj tiel igas la ĵorkon perfoksi.

La ludantoj devas ŝanĝi la kropukojn post ĉiu tirpeso de dek du batoj.

Ĉu ni ekludu ?

⁸: Meritas mencion, ke la ŝajne nur porinfanaĵ legolibroj *Alice en Mirigolando* kaj *Tra la Spegulo*, de la brita matematikisto C.L. DODGSON, alinome Lewis Carroll, konsistigas riĉan fonton de citaĵoj por... scienca teorumado, kaj same en Usono la komparebla serio de Frank BAUM pri *La Sorĉisto de Oz*, eĉ pli ol faras la klasikaj teatraĵoj de SHAKESPEARE!

Bedaŭrinde, kiom koncernas la pure stilisman aspekton, la semantika sagitala akso havas tiomege multajn ligojn kun tiel ti aŭ tiel ĉi parencaj nocioj en plejeble komplikita — ja eĉ ĉirkaŭvoja — maniero, kaj ĝi estas tielege influita de sociologiaj kaj psikologiaj faktoroj, ke mi dubas, ĉu vere eblos klasifiki stilfigurojn same rigormetode kiel oni klasifikis gramatikaĵojn. Des malpli eblos, laŭ mia opinio, apliki al ili la interkomparan metodon, tiel fruktodonan en strikte lingvistika-gramatika kadro. Estas iom kiel en meteologio, kie ankaŭ ne eblas antaŭdiri la evoluon de tre moviĝemaj vapor- kaj aermasoj en la modera klimat-zono, trans pli ol kelkaj tagoj. Aliflanke tamen, la alegoriaj arketipoj, en psikologio malkovritaj de Carl Gustav JUNG, ŝajnas promesi ke la serĉado de stilismaj universalaj estos ne vana komplete, kaj do plu indos la penon serĉadi.

* * * * *

Pro la supraj rekonsideroj pri lingvotipigaj kriterioj, mi rearanĝis la priteman terminologion laŭ ĉi-posta skemo, en kiu ekkoneblas ĉiufoje unu el la ekstremajoj de koncerna akso kaj al kiuj oni povas, se dezirate, aldoni ankoraŭ iun mez-pozician tipon:

- I - DIATAKSAJ LINGVOJ (ĉefe fleksiaj)**
disfleksiaj ("aglutinaj" ...)
polifleksiaj ("fleksiaj, fuziaj" ...)
- II - SINTAKSAJ LINGVOJ (ĉefe aglutinaj)**
disaglutinaj ("izolaj, analizaj" ...)
poliaglutinaj ("polisinteza, enkorpiĝaj" ...)
- III - PARATAKSAJ LINGVOJ (ĉefe tropifaj)**
distantropifaj ("izolaj, analizaj" ...)
politropifaj ("izolaj, analiza" ...)

La tasko de preskriba terminologio estas malkovri la ligojn inter ekzistantaj interkonceptoj kaj terminoj en la diversaj fakoj kaj esplori ligojn ekzistantajn inter la konceptoj mem. Priskriba laboro pro tio estas valora antaŭŝtupo por ebligi preskriban laboron. Pro tio ke disvolviĝado sen bridaj kauzas sinkontraŭdirojn kaj nekonskvencojn en la terminoj, kaj fine kondukas al ĥaosa situacio en interkomunikado, normigaj leĝoj fariĝas urĝe necesaj por terminologio. Tiaj normigaj leĝoj celas atingi harmoniigon kaj senambiguigon en la terminaroj de koncerna fakoj. (H. FELBER)

3. AL LA ESTINTECO

3.1 La Turo de Babel

Trans la nivelo de ĉiuj intense studitaj [gravaj] lingvogrupoj en lingvistiko, oni ne povas ne indukti iaman ekziston de iu komuna devenfonta pralingvo, pri kiu bedaŭrinde (ankoraŭ) ne ekzistas senpere konsulteblaj dokumentoj. Tiun praavon oni sekve "rekonstruas" hipoteze, laŭ reguloj de probableco, precipe rilate al ĝia vortostoko. Plej bone tio sukcesis, pro ekzisto de relative riĉa dokumentaro, je la tiel nomata "hindeŭropa" kaj ĝia lingvokomunumo — la "kaŭkaza raso" de Arjoj — kiu laŭtakse okupis, aŭ almenaŭ influadis, la vastan regionon inter Hindujo kaj Atlantika Oceano.

Rilate la HE menciindas grava informfonto, kiun mi renkontis ankoraŭ en neniuj **faka** traktaĵoj pri lingvistiko, ĉar ĝi ja estas mistik-natura kaj tial "nescienca". kvankam ĝi trafe martelfrapas la najlon. Nome: la germana mistikulino kaj stigmatulino¹⁰ Anna-Catharina EMMERICK (1774-1824). Ŝi postlasis al ni abundege detalajn informojn pri primhistoriaj¹¹ tempoj, kiujn ŝi ekkonis per siaj (partoprenaj) vizioj en la kadro de bibliaj eventoj aŭ de la vivo de Jesuo. Inter tiuj troviĝas priskribo kiel vere okazis la granda disbranĉiĝo de lingvoj, okazinta kaŭze de la "Turo de Babel" [Gen. 11], ĝenerale konsiderata en sciencaj kaj eĉ ekzegezaj medioj kiel nura mito.

Tiu priskribo, mallonga sed sufiĉa, estas tia ke la antikva evento perdas sian legendecan karakteron. Unue, la viziulino eksponas la manieron per kiu NIMROD, iu kombinaĵo de eminenta arkitekto, generalo, kaj ŝtatestro — sukcesis kunlaborigi 25 tribojn al la multjara starigado de grandege alta turo,

10: Stigmatul(in)o estas persono, ekskluzive en la katolika eklezio, kiu ricevis en sia korpo la krucumvundojn de Jesuo, kaj tiamaniere aktive partoprenas en daŭrigo de la Pasiono. (Prave rimarkigis PASCAL ke "Jésus est en agonie jusqu'à la fin du monde".) Estas oficiale registritaj ĝis la hodiaŭa tago ĉirkaŭ 700 tiaj kazoj en la eklezia historio, inter kiuj nur malmulte da viroj; fama escepto estas la bonkonata Sankta Francesco (1181-1226), fondinto de la Franciskana Ordeno. La turmentegoj, kiujn koncernatoj volonte akceptas kaj eĉ deziras (!), pro amo al la Savanto, estas akompanataj de ekstazo en kiu la stigmatul(in)o aŭdas, vidas, eĉ palpas, aferojn kiuj troviĝas "transe" de nia spacotempo. Kvante kaj kvalite tiu mistika fenomeno ege superas ĉion, kio hodiaŭ estas tiel laŭmode propagandata kiel "orienta mistiko". Bedaŭrinde, nur etpocento el ili postlasis detalajn dokumentojn pri siaj mistikaj travivaĵoj, kaj nur manpleno el tiuj traktas temojn rekte interesajn por sciencistoj. Sed tiuj malmultaj estas tiel valoregaj, ke oni devas miri pri la ĝeneralaj obskurantismo kaj bojkotado; ne nur flanke de la pozitivisma sciencistaro, sed ankoraŭ pli — skandale pli — flanke de ilia propra eklezio! La sorto de profetoj neniam estis enviinda ...

11: **primhistorio** = La epokoj tuj antaŭ kaj tuj post la Diluvo, okazinta supozeble ĉirkaŭ dekmil jaroj AD.

sur tereno de proksimume 20 km² (por la sola fundamento, kio egalas la areon de urbo kia Antverpeno!) kaj pluroble pli vasta logistika areo (laŭtakse egala al eble 3000 km²). Por tiu entreprenego li lokigis la tribojn ventumile kiel la spokojn de granda rado. Ĉiu vilaĝo do eksetlis sur unu ekstremaĵo de tia "spoko", kaj iom post iom konstruis por si mem grade supren kondukantan transport-vojon al la komuna laborcentro; tute do laŭ la principo per kiu jarcentojn poste la Eĝiptoj (konjekteble) planis la konstruadon de siaj piramidoj. Ĉefa celo: havi rifuĝejon por savi elektitaron el eventuala nova Diluvo, pri kiu katastrofego ankoraŭ cirkuladis teruraj rakontoj, transdonitaj de la praavoj.

Bedaŭrinde, kiam post kelkdek jaroj ili komencis faradi "nur" la duan/trian etaĝon, ankaŭ la ekira sindediĉa entuziasmo komencis cedi lokon al mal-kontento pri... rekompencoj (salajroj). Unuj metiistoj — precipe tiuj ŝargitaj per skulptado kaj ornamado — ekopinis sian propran kontribuon pli valora ol tiu de aliaj metiistoj, kaj unuj triboj ektaksis sian parton de la entrepreno multe pli peza kaj sendanka ol tiu de la aliaj triboj. Okazis ĉiam pli kaj pli da disputoj kaj kvereloj, kaj la repacigaj intervenoj de NIMROD fine jam ne povis malhelpi ekeston de interbataloj. Oni kredus legi pri tute modernaj sindikataj disputoj kaj strikoj!

Rezulto: pluraj triboj kunfaldis siajn tendojn kaj kolere migris for al novaj regionoj, dezirante havi plu neniun kontakton kun la ceteraj popoloj parencaj. Tra sinsekvaj generacioj tiele naskiĝis en izoliteco ankaŭ iom post iom novaj deviaj lingvoj*. Kaj tiamaniere fiaskis la grandioza revo de NIMROD kiu, sen-iluziigite, fondis kun lojala restintaro la novan urbon — ja urbegon — Ninivē, por kies konstruado li reutiligis modlitajn ŝtonblokojn kaj reliefaĵojn el la fifama Turego.¹² Oni rimarku ke la Biblio, eĉ en siaj supozate plenlegendaj ĉapitroj, estas por moderna pensmaniero do tamen ne tiel malkredinda, se oni rigardas trans la tipajn envortigon kaj prezentformon de antikva civilizo! Krom tio, almenaŭ unu plia stigmatulino — kial damne ĉiam nur virinoj? — nome Leonie VAN DEN DIJCK (1875-1949) el Belgio, kiu estis preskaŭ same analfabeta kiel ŝia germana antaŭulino, rakontis precize la saman historion en siaj vizioj, kvankam ne tiel detale.¹³

*(Vidu p.30)

12: La tradicia nomo "Babel" aludas ne necese la faman ĉefurbon Babilono mem, sed kredeble jes la landon Babilonujo, kaj pli specife iun nordan regionon inter la du grandaj riveroj de Mezopotamujo, evidente en apudeco de riĉa akvoproviz-ejo. Nenio malhelpus do la postekziston de ruinaĵoj de tiu antikvega monumento, en formo de tumuluso tiel vastampleksa, ke ĝi hodiaŭ aspektus kiel natura geologia altejo kaj tiel eskapus la atenton de arĥeologoj. Eble eĉ meze (sube de) fama Ninivē, kiu tiamdo konstruatis sur la antata tereno de la Turo.

13: Sola publikaĵo ĝis nun, pri tiu ĉi lasta mistikulino kaj ŝiaj vizioj kaj profetaĵoj, estas la nederlandlingva verko *Het wonderbare leven van Leonie Van Den Dijk* [eld. Komiteit LVD, Kampstraat 35, B-9500 Onkerzele, 1987], aŭ la resuma broŝureto *De zieneres van Onkerzele*.

Jen do mistika rimedo por rekonstrui la evoluon de lingvoj! Religio miksas sin en sciencajn aferojn, vole nevole...

3.2 La Hindeŭropa Lingvo

Sed revenu ni al la demando pri eventuala komuna devenfonta lingvo, kiu ekzistis antaŭ ol la babeltura konflikto. La sama mistika fonto (Anna Cath. EMMERICK) certigas, ke la gento de NOAĤ, kaj ankoraŭ relative longatempe ilia posteularo, parolis **unu saman lingvon**, el kiu disbranĉiĝis laŭgrade "... la baktria, la zenda, kaj la sankta lingvo de Hindujo", kaj ke de tiu lingvo ankoraŭ postvivas konsonantoj kaj vorteroj en ŝia propra germana dialekto (de la federala ŝtatprovinco WESTFALEN). Do: tute kongrue kun la aktuale akceptita vidmaniero de lingvistoj, sed eldirite *in tempore non suspecto* !

Ankoraŭ pli interesa por ni estas ŝia deklaro pri tamena ekzisto de dokumento el tiu praepoko: "La libro, kiun mi vidas enterigita profunde en la hodiaŭa KTESIFON, apud Rivero TIGRIS, estas verkita en tiu origina lingvo".¹⁴ Ni esperu, ke la nuntempe pli kaj pli kreskanta malfermiteco de sciencistoj por fenomenoj kaj donitaĵoj, ekster la mem-fabrikita kaj tro strikta kamizolo de pozitivismo-materialismo, diktatorece dekretita de la 19^a jarcento, baldaŭ sukcesigos arĥeologojn retrovi kaj elfosi tiun valoregan "libron", kaŝitan en militplena islama lando!

(en la senco de "paperaĵo")

Se efektive malkovrita, tiu dokumento estus eksterdube la plej antikva skribaĵo iam ajn trovita aŭ trovota en nia mondo, kaj do antaŭanta eĉ la Vedojn, ja skribitajn en pliposta Sanskrito...

Por ne lingvistaj legantoj eble ne superfluas mencii, ke tiu pralingvo tute ne povis esti la hebrea! Ja ĝis en nia propra epoko renkonteblas personoj kiu, konsiderante la hebrean "sankta lingvo de la Biblio", nepre opinias ĝin tielege Di-donita, ke ĝi ne povas ne esti la "lingvo de Adam kaj Eva". Prava premiso ja ne necese gvidas al prava silogisma konkludo! Nu, el la sama mistika informfonto — konfirme al tute sciencaj esploroj, aŭ inverse — ni ekscias ke, longe post Edeno, sed en la epoko de la Turo de Babel:

14: Pri la ĉi-temaj vizioj de Emmerick oni povas legi germanlingve en *Die Geheimnisse des Alten Bundes* [Augustinus Verlag, Würzburg, Deutschland, 1969], aŭ franclingve en *Les mystères de l'Ancienne Alliance* [Editions Téqui, 82 rue Bonaparte, F-75006 Paris (1977)].

15: Pri la principoj kaj efektivaj eblecoj por tia realigo, kiu postululus ekregon jede gravito, temas mia (nur en Esperanto-bibliotekoj ankoraŭ konsultebla) broŝureto *Pri gravito kaj tempo* (1966).

Dio metis sian rigardon sur Heber, kiu ne kunlaboris je la Turo, por antaŭsavi lin kaj lian [ŝemidan] posteularon de la devojiĝo kaj koruptiĝo ĝeneralaj: Li intencis fari el ili Sanktan Popolon, apartan. Tiucele Li donis al ili ankaŭ novan lingvon sanktan, kiun neniu alia popolo scipovis, por ke ankaŭ ĝia tuta generaciaro restu apartigita; estis la hebrea aŭ pur-ĥaldea lingvo. La lingvo origina, tiu kiun parolis Adam, Noaĥ, kaj Ŝem [do, la hindeŭropa!] estis tute alia.

Sur tiu bazo oni povas konkludi, ke serĉado je ankoraŭ pli frua lingvoŝtupo, tiu de "proto-hindeŭropa" aŭ "nostrata", kiu povus validi kiel prapraavo de absolute ĉiuj lingvoj en la mondo — do ankaŭ de la ne-hindeŭropidoj — estas dekomence vana, ĉar ĝi probable neniam ekzistis. Komprenoble, tio ne malhelpas ke koncernaj esploroj povas tute bone alporti tamen tre utilajn fruktojn!

Kiamaniere do jes ekspliki la ekziston de kromaj lingvofamilioj, kiaj la suom-ugra, la bantua, la malaj-s-polineza, la ĉin-tibeta, la indiana, kotopo? Ĉu ties dinasti-fondaj pralingvoj siavice naskiĝis ĉiu tute sendepende de la ceteraj, aŭ ĉu ankaŭ ili posedis komunan fundamenton tut-homaran, plej antikvan kaj unikan? Aktuale ekviglas provoj interrilatigi lingvojn ankoraŭ pli vaste kaj profunde, por atingi la nivelon de tutunika pralingvo de la tuta mondo, la "nostrata". Tiu malfacilege respondebla problemo — eble eĉ neniam respondebla per nure ekzakt-sciencaj donitaĵoj, almenaŭ se ni neniam sukcesos realigi tempoveturadon¹⁵ por ekzameni ĉion *in situ* — kredeble intime ligiĝas al antropologiaj disbranĉiĝoj de la specio Homo. Ĝis apero de solidaj argumentoj, mi persone emas kredi je eble kaj eventuale kvino da "sinkrone" ekzistintaj ĉefrasoj en la aŭrora tempo de la homaro, kiuj ĉiu samtempe kun la raso de "Adam kaj Eva", sed sendepende de ili, "inventis" propran lingvon.

Tio kondukas nin transen de la strikte "lingvoteknika" problemaro al la grava filozofia problemo pri la origino de la homa lingvo(kapablo).

Kiu volas kritiki la "fantastic paroles" de Esperanto, tiu pruvu ke ili kontraŭas al la zamenhofa principo. Se tion li ne povas, li ne kritiku detalojn, sed ataku la principojn kiujn Zamenhof aplikis kaj klare montru kial ili ne taugas.

[W. Manders en "Interlingvistiko kaj Esperantologio"]

4. ORIGINO DE LA HOMA LINGVO

4.1 Mita Deveno aŭ Evolua Deveno ?

La teoriojn aŭ hipotezojn pri estiĝo de la lingvofenomeno oni povas grupigi en du ĝeneralajn grupojn: mitologismajn kaj (pseŭdo)sciencajn.

En mitologia kadro oni trovas la ideon ke dio(j) instruis tiun kapablon al la homo. Tiel en la Biblio [Gen 2: 19,20] la Kreinto igas sian kreitaĵon, ADAM, doni nomojn al ĉiuj plantoj kaj bestoj. En la Korano oni legas ke Dio eĉ rekte instruis parolkapablon al la homo. Ĉe la Eĝiptoj faris tion THOT, kaj ĉe la Helenoj estis la pagandio HERMEES, kiu donacis skribon kaj lingvon. La homo, laŭ pliparto el tiuj mitoj, do ricevis la parolarton senpere; neniel mem kreis ĝin.

En evoluisma kadro oni trovas la ideon, ke lingvo(j) estiĝis iom post iom, pro naturaj impulsoj, ĉar sentoj kaj emocioj (ĝojo, sufero, ĉagreno, timo, seksardo) esprimiĝas per parolorganaj sonoj, same kiel ĉe la bestoj. Ĉefa estiĝobazo **pŭr** kaj kerno **dĕ** lingvo tiele estus onomatopeoj.

Legendan ekston apenaŭ iu ankoraŭ kredas hodiaŭ, escepte de ĝisostaj "fundamentalistoj". Sed ankaŭ evoluisma estiĝo fariĝis neakceptebla koncepto, post kiam oni firme establis ke lingvo estas **kultur**fenomeno kaj ne pro ne **natur**fenomeno. Beboj, kiuj naskiĝis respektive en Ĉinujo, Zairujo, Brazilujo, Hungarujo, ĉiuj en idente sama maniero ploras, ridas, trinkas, manĝas, kaj eligas sonojn, sed ili fine parolos kvar tute malsamajn lingvojn. Ĉi-koncerne ekzistas eldiro de la konata usona lingvisto Edward SAPIR en lia verko *Language* :

Kiom ajn oni emas en la lingvoj de primitivaj gentoj, surbaze de ĝeneralaĵaj principoj, atribui fundamentan gravecon al imitado de naturaj bruoj, restas fakta aferostato, ke tiuj ĉi lingvoj montras nenian specialan preferon por onomatopeoj. Athabaska-tribanoj de Rivero Mackenzie lekzemplel, kiuj estas plej primitive (vivantaj) indianoj, parolas idiomojn en kiuj tiaspecaj vortoj komplete aŭ preskaŭ komplete mankas, dum tiuj ĉi abundas en alte organizitaj lingvoj, kiel la angla aŭ la germana.

16: Rigardu en *Akademias Studoj 1987*, paĝo 15.

Se la vorto *kokeriki* laŭsone imitas krimon de virkoko, aŭ la vorto *kukolo* la vokon de tiu birdo, tio sekve neniel signifas, ke ni havas aferon kun natura estiĝokerno de lingvo.

Konstrui tezon sur tia bazo, estas do same vana kiel rekonstrui "la" originan homlingvon prenante apogon sur la unuaj parolsonoĵoj de bebo, eĉ se tiu ĉi estus edukata en plejble kompleta izoliteco — kiel onidire iam eksperimentis eĝipta faraono. Aŭ same vana kiel tion klopodis fari la flandra filologo kaj kuracisto J.G. BECANUS (1519-1572), kiu venis al la naiva konkludo — per tute imagaj etimologiaj analizoj pri vortoj en la dialekto de Antwerpen — ke tiu ĉi idiomo estus la origina lingvo de Edeno. En alia verko, *What is Language*, SAPIR diras:

Lingvo estas pure homa kaj ne-instinkta metodo por transdoni ideojn, sentojn, kaj dezirojn, helpe de sistemo de arbitre produktataj simboloj. Tiuj ĉi simboloj estas unuainstance akustikaj; ili estas produktataj per la t.n. parolorganoj. Oni ne povas distingi iun instinktan bazon en la homa lingvo kiel tia, kiom ajn instinktaj esprimoj kaj la naturmedio povas efiki kiel stimuloj por la disvolviĝo de determinitaj lingveroj [onomatopeoj], kaj kiom ajn instinktaj emoj, ĉu [organmotoraj aŭ alispecaj], povas doni determinitan direkton aŭ karakteron al lingva esprimado.

Ĉiuj objektivemaj lingvistoj sekve akordiĝas por konkludi ke lingvo estas specife homa fenomeno, kiu retroveblas nek ĉe bestoj, nek (ĝis nun) ĉe elektronikaj aparatoj — kiel ajn perfektaj tiuj estu. Nek ĉe bestoj, nek ĉe maŝinoj, oni ja retrovas la ĉeftraĵon de homa lingvo: ĝian kreokapablon. Kaj estas ĝuste tiu ĉi centra faktoro kiu igis Noam CHOMSKY deklari, en sia verko *Language and Mind* :

Lingvo estas tiu admirinda invento per kiu ni, helpe de [kelkaj] parolsonoĵoj, kapablas formi senfinan liston de frazoj, kiuj enfakte montras nenian similecon kun tio kio okazas interne de nia menso, sed kiuj tamen ebligas nin komuniki al ceteruloj la sekreton de nia pensado kaj de ĉiuj niaj mensaj agoj.

Ĉu do jam anticipe vana ĉiu provo elfosi la **originan** procezon, la ekeston de "lingvo" en la specio Homo? Jes, se ni daŭre restos en la tro limigita kadro de pozitivismisma-materialisma pensado aŭ de mitologiaj rakontoj. Ne, se ni kuraĝos transpaŝi unu plian fojon tiun penslimigan muron.

4.2 Metapsika Deveno

Sufiĉas ja akcepti — povi akcepti — ekziston de metapsika (parapsika, paranormala, esotera, psikotrona) nivelo en la homa naturo, alidire de pure spirita "dimensio" en ĝi, por trovi sufiĉe klaran kaj racian respondon al la

problemo. Bedaŭrinde, regas ankaŭ sufiĉe granda konfuzo en la determinado de tiu faktoro, kaj sekve ankaŭ en la koncernaj terminoj. Persone mi adoptis vizion pri tri-tavoleco en la Kosmo, sur sama rezonvojo kiel tiu pri la spacotempa tri-dimensieco [2.5]. La principo pri tri fundamentaj tavoloj aŭ niveloj ĉetere re-troveblas en la akumuliĝaj ŝtupoj de instruado (baza, meza, supera)¹⁶ kaj de sciado (datenbanko)¹⁷. Nu, laŭ tiu vizio, absolute plena — tio estas: komplete disvolvita — triniveleco ekzistus ekskluzive en la homo — ja "farita laŭ bildo kaj similaĵo de Dio" [Gen 1: 27]. La klasikan dualismon inter "korpo" kaj "spirito", nesufiĉan por kovri senescepte ĉiujn fenomenojn **en** kaj ĉirkaŭ la homo, mi do precizige kompletigas laŭ jena kreskanta vicigo: *korpo* (materia nivelo), *manaso* (metapsika nivelo), kaj kulmine *animo* (teologia nivelo). Tiuj tri tavoloj povas interpenetriĝi, de supre malsupren, kvankam ekzistas baraĵoj kaj obstakloj inter ili. Precipe la interagado de metapsikaj fenomenoj ("esotere" mensaj) kun fiziologiaj fenomenoj (do pensade cerbaj) tuj koncernas nian problemon.

En tiu ĉi demando certe ne validas la pozitivisma¹⁸ principo, ke "la tuto estas ĉiam nur la sumo de ĝiaj partoj" — kvazaŭ pozitivismaj filozofoj konus nur matematikan adiciadon kaj ne multiplikadon aŭ eĉ potencigadon. Nura amaso da brikoj kaj mortero ja per si mem ne povas konsistigi domon; kaj nura amaso da stangoj, ŝraŭboj, radoj, kabloj kotopo per si mem ne povas formi maŝinon — certe ne funkciantan maŝinon. Por tio necesas jam interveno de iu konstru-plano, de iu organiza **ideo**, kiu muntas la elementojn ĝis kohera tutaĵo.

Tute same iu kolekto da simboloj (paroloj) ankoraŭ ne konsistigas lingvon. Necesas gramatiko por tio, do organiza plano, kaj eĉ plie interrilatigita nociaro. Frapan ekzemplon havigas ĝuste la kreinto de nia Lingvo Internacia. Li ja pli-malpli arbitre depruntis amason da vortoj (radikoj/afiksoj) sed inventis personan regularon por tiujn interrilatigi.

Simile la unua(j) homo(j) disponis jam pronature, post longega biologia disvolviĝo, anatomian aparaton kapablan generi kelkdekon da malsamaj sonoj — la parolsono(j). Bezona estis tial nur unu plia faktoro, sed gravega faktoro: volo kaj ideo por tiun aparaton utiligi por tiu celo! Eĉ se ni supozas, ke la unuaj homoj ankoraŭ ne konsciis la fundamentan nocion pri kontrastigo de parolsono(j), pri t.n. "minimumaj paroj"¹⁹ ili tamen tute nature kaj en praktiko sendube scipovis tiajn produkti. Sufiĉus tiele ke nur **unu el ili**, geniulo, ekhavis la ideon **en sia menso** laŭplane kombini tiujn de la naturo mem proviz-

17: Same en *Akademijaj Studoj 1985*, paĝo 54 (296).

18: La termino "pozitivisma" estas uzata en tiu ĉi eseo kiel etikedo por la tuta mondpercepta bildo, kiu disvolviĝis post la Eŭropa Mezepoko, kaj al kiu kontribuis pioniroj kiaj DESCARTES, NEWTON, HEGEL, COMTE... Ĝi do certe entenas ankaŭ "determinismon".

19: Vidu mian *Universala Skribo* [SUE-2].

itajn sonojn, por ke jen tiu ĉi kombinaĵo (el konsonantoj kaj vokaloj aparte, aŭ jame el silaboj) **arbitre** signifis tiun ĉi aŭ tiun ti objekton ("akvo, manĝi, doloro, ami, defio") — kaj ke ĝi instruis tiun **kodon** al la kunfamilianoj — por ke ili senplie posedu la interkomunikilon, kiun ni nun nomas lingvo. Tiele, la jam antaŭe organizita pensaro povis trovi elfluejon al la ekstera mondo. Sed ne malatentu la mension "jam antaŭe organizita"! Mia aksiomo ja estas "nenio el nenio". Konkretigo de la lingvokapablo nepre antaŭpostulas jama ekzisto de iu ĝia strukturo, eĉ se 'nur' abstrakta.

4.3 Ekesto de Lingvo en la Sulko de Origina Peko

En mia perspektivo, la tuta lingva strukturo do ekestis **unue** sur la meta psika ŝtupo kaj iam **poste** realiĝis konkrete sur la korpe materia ŝtupo. Oni do ne povas paroli pri *Creatio ex nihilo*. Ankaŭ rilate al lingvo la homo faris ion paralelan al la krea ago de Dio, en kio la (kristan)teologia koncepto "Verbo" estis esenca faktoro laŭ Joh 1: 1-3. Estas mia opinio, ke tiu ĉi lingvokrea ago iel intime ligiĝas al la Origina Peko (pli ĝuste: Origina Ribelo), pri kiu same rakontas la Biblio [Gen 3] kaj de kies realeco kaj vereco nepre dependas la kompleta judo-kristana doktrino.

Posedante jam denaske senobstaklan uzadon de siaj grandaj metapsikaj ("subkonsciaj") povoj — inter kiuj por komunikadaj celoj ja efikegis telepatio — en maniero kaj grado kiu hodiaŭ ŝajnus al ni mirakla, la unuaj homoj tial principe bezonis nenion plian por esti tute feliĉaj kaj liberaj, kaj por absolute estri la tutan naturon. La sola elemento kiu mankis al ili, aŭ kiu ŝajnis manki, estis la principa ebleco ekuzi ankaŭ siajn strikte cerbajn kaj korpajn (materiajn) kapablojn por ion ekscii aŭ fari. Nu, ĝuste tiuj fiziologiaj eblecoj estis ial tabuaj kaj tial mistere allogaj. Mi tamen ne intencas aserti, ke konkreta ekuzo de la parolkapablo — en lingvistiko la nocio "kompetenteco" — konsistigas la esencon de la biblia pekofalo, sed ja ke ĝi estis ia ravega konsekvenco: eble la plej grava, rigarde al la homa evolu-historio.

Interesajn konfirmojn, ke la stereotipa kunligo de Origina Peko kaj **iu** sekso-**peko** estas prava, liveras la alegoriaj sed ne miskompreneblaj vizioj denove de Anna-Catharina EMMERICK kaj krome la revolucia metodo de Fernand CROMBETTE (1880-1970), kiu utiligis la koptan lingvon por reinterpreti malnovajn tekstojn hebreajn; per ilia samorigina skribo. Laŭ ĉi-lastata interpreto, la unua homparo (kiu estis la unua paro **spirite** reprezenta kaj respondeca por la tuta specio *Homo sapiens*) ja ricevis de Dio ordonon multobliĝi kaj plenigi Teron, sed ne komprenis kial Javeo postulis antaŭe iun provotempon de abstenado, por tion fari. Ĝi estis vualita sekreto, malkaŝota kaj plenumota nur en "oportunaj tempo kaj cirkonstanco" akorde kun la Dia Plano.

Sed virina scivolemo, vekita kaj direktita de demona influo, ne povis ĝisatendi tiun momenton por "ekmanĝi de la arbo de scio pri bono kaj malbono", kiel rakontas la ĉapitro Genezo.²⁰

Tial, ke tamen okazis la malĝusta elekto, la Tragedio de la Homo do startis, ekde **pure spirita premiso**, iom analoge al la kosmologia "Granda Krako" el kiu naskiĝis la materia universo. La lingvouzo miaopinie do tuj sekvis aŭ kunsekvis la falon.

Estus ankoraŭ multo dirinda kaj direnda pri la cirkonstancoj, kondiĉoj, kaŭzoj, kaj sekvoj de tiu tragedia elpaŝo, sed tie ĉi mi ne intencas prediki kiel pastro, sed ja okupi min sole pri demandoj starigitaj de la lingvofenomeno.

Eble en la komenco temis pri ankoraŭ ne plene rafinita formo de lingvo, sed ja pri iu "baza fundamento" laŭ la komenca modelo de Esperanto mem. Al tiu fundamento iom post iom, pro evoluado, aldoniĝis en la socio pli fajnaj kaj kompleksaj strukturoj. Komparante tiun evoluon, unupartite kun la "lingvo" de nia sonĝa subkonscio, kaj aliparte kun la ĝenerala evoluo de skribo, mi emus aserti ke en la komenco estis uzata sole, aŭ preskaŭ sole, la semantika akso, kiu ja plenegas je "bildoj" kaj estas ankaŭ la plej potenca instrumento: "unu bildo diras pli ol mil vortoj". Sed tamen fundamento en si mem jam sufiĉe vasta kaj strukturita — kun bazaj elementoj kaj reguloj — kaj do sufiĉa por ke la koncernatoj povu apliki kaj ekzerci sian "kompetentecon", laŭ la signifo al tiu ĉi lingvistika termino atribuita.

Al ekesto de lingvo miaopinie tiel necesis, kaj sufiĉis en la "paradiza" situacio, nur la penso/volo pri ties efektivigo, iom simile kiel genia komponisto foje per subita inspiro povas senpere krei belan muzikaĵon, sen eĉ poluri ĝin, aŭ kiel la angla poeto S.T. COLERIDGE verkis sian longan baladon *Kubla Khan* senhalte kaj senpripense en unu nokto. Kaj ĉu ne eĉ pioniraj sciencistoj "ekzaktaj" kiaj ekzemple DESCARTES mem (la patro de fundamenta scienca metodeco!), NEWTON (pri la universaleco de gravito), KÉKULÉ (pri la strukturo de aromatoj), unua-instance ekiris de iu enigma inspiro subkonscia, aŭ eĉ de iu malracia sonĝo/revo, kiun ili nur poste kaj en verkonscia stato ellaboris ekzakte? El kie ili do ĉiuj ĉerpis tiun **subitan** scion,

20: Preterpase notu, ke la koncerna teksto tute ne parolas pri iu **pomo**, sed nur pri simbola kaj reprezenta "frukto de ...". Identigi ordonon kaj malpermeson estus krome paradokso, sen tia aldona kondiĉo, kiu ege similas la moralan malpermeson en pliparto el la homaj socioj, kontentigi sian seksardon ekster antaŭvidita kaj loĝe rajtiga geedzeco. Oni cetere ne preteratentu la (katolikan) doktrinon, ke la unuaj homoj plene ĝuadis superecon de la 'spirito' super ĉio materia, kaj ke tiel ili neniel povis senti altrudon de seksardo — fenomeno strikte korpa. Lastvico, ne lastrange, tiuj kiuj certigas ke temis efektive pri kuplado, same certe ne bone legis la koncernan perikopon, ĉar estas tre nete deklarite ke ambaŭ prauloj pekis **aparte**, nome EVA kiel unua, kaj ADAM nur poste. Al mi estas enigmo kiamaniere oni povas tion identigi kun efektiva koitado; aŭ eble mi ne bone scias pri tiuj aferoj, spite mian aĝon kaj miajn infanojn...

se ne el tiu sekreta ĉambro, kiun eĉ NOBEL-premiitoj ŝatas nomi "scienca intuicio", el tiu kaŝita trezorejo en kiu spaco kaj tempo strukture interpenetriĝas?²¹ Lingvikiste parolante, oni do povus diri, ke "unue estis la fronogloteco <competence> (aŭ sistemo de tipoj), kaj nur poste estis la pojogloteco <performance> (aŭ sistemo de signoj).

Se tiu mensa kapablo, tiu spirita faktoro el kaj ĝn la "manaso", jam de la unua momento de homiĝo — se pruntepreni terminon kara al Teilhard DE CHARDIN — ne estus antaŭ-ekzistinta, tiam oni efektive neniam trovos respondon al la problemo pri ekesto de la homa lingvo. Aktuale neniu serioza lingvisto ja plu subtenos "solvon" per natura evoluprocezo, ekde iuj onomato-peoj, dolorkrioj, aŭ similaj, escepte kompreneble de ĝisostaj marksistoj por kiuj "historia materialismo" estas panacea dogmo neŝancelebla... Sed se efektive ekzistis/ekzistas la metapsika nivelo, sur kiu mi prenas apogon, tiamdo la naskiĝo de la homa lingvo fariĝas kristalklara. Ŝlosila principo konsekvence estas: enigo de la manasa (spirita) dimensio en la homan estaĵon, pere kaj pro enigo de eĉ pli alt-dimensia tavolo — la "animo". Nur la manasa nivelo kapablas liveri la nepre bezonan kreopovon por lingvo.

La fakto, ke ankaŭ skipo da homoj povas en principo realigi tian planon, sen interveno de iu supera dimensio — kiel ekzempligas la kreo de *Interlingua* fare de la IALA-komisiono — ne malvalidigas mian argumenton, ĉar ankaŭ tie kaj tiam necesis almenaŭ unu homo (D-ro GODE) por starigi kaj stiri la plangrupon. Kio pli estas: ili ĉiuj laboris sur la bazo de jam konkrete ekzistantaj lingvomodeloj, el kiuj eksperimente distili unu novan. Kaj tio estas nenio pli ol gvidata "kreol-igo".

Kompreneble, ĉar parolsonoj estas kombineblaj en teorie senlima nombro da manieroj, la kvanto da eblaj lingvosistemoj estas ankaŭ arbitre granda. Tio volas diri: se estis nur unu homgento je tiu samfrape grandioza kaj fatala komenca momento de homiĝo, tiam ankaŭ estis nur unu lingvo — ĉi-kaze la "hindeŭropa". Kaj se estis pluraj homgentoj en la sama dilema situacio, tiam do ankaŭ pluraj dinasti-fondaj protolingvoj. Monofilogenezo kontraŭ polifilogenezo. Konsiderante la grandajn ras-diferencojn kaj geografiajn apartiĝojn, mi private emas — kiel jam asertite en ĉapitro 3.2 — adopti pluropecon.


Tio kaŭzas novan demandon rilate al spirita interligiteco de la tuta pratempa homaro, sed denove tia temo plu ne tuŝas lingvojn kaj lingvistikon, kaj do ne traktiĝu tie ĉi. Des pli ne, ĉar mi jam frakase eliris la kutiman kadron de "sciencaj" eseoj kaj devas timi mokridojn el la fakula tendaro... Unu el la statutoj de la *Société Linguistique* en Parizo ja dekretas ke membro, kiu

21: Parapsikologoj opinias preskaŭ unusente, ke tempo kaj spaco (plu) ne ekzistas en tiu stranga regno de la manaso, sed mi ne partoprenas ilian indukton. Tiuj du fundamentaj determinantoj en ĝi ja ekzistu, sed en **sublimita** formo, kiu permesas al la homa konscio eventuale trapasi la tempajn kaj spacajn barojn de nia mas-energia universo materia.

provus fari prelegon pri la lingva origino, estos aŭtomate eksigita. Feliĉe, mi ne estas respondeca membro de tiu prestiĝa instituto, sed nur libervaganta filistro.

Nu, spite la minacantajn mokridojn kaj insultojn, mi tamen muntis iel racian respondon al la ŝajne nesolvebla enigmo pri ekesto de la homa lingvo, "nur" ŝanĝante la paradigmon, kvankam ĝi evidente fariĝis metafizika-teologia respondo. Mitologia elemento (interveno de dioj) do plu ne nepre kontraŭas materialan elementon (natura evoluo), sed se ĝuste komprenite l'unu faktoro tute simple kaj evidente kompletigas la alian. Ankaŭ en tiu ĉi lingva perspektivo, montriĝas do urĝa tempo konsideri la Genezon pli serioze ol fariĝis kutimo ĉe la "racionalismaj sciencistoj"! Oni devas bone fari distingon inter alegoriaj rakontoj kaj la realeco, kiun ĝi kaŝas. (Ĉu ankoraŭ bezone memori la kazon de SCHLIEMANN kiu, kvankam estante nur amatora arĥeologo, taksis la lliadon de HOMEROS tute serioza, kaj sekve de tio malkovris la supozatajn ruinojn de TROJE?)

- "Mi," diris Humpty Dumpty malestime, "kiam mi uzas iun vorton, ĝi signifas ekzakte tion kion mi decidis ke ĝi signifas, nek pli nek malpli."
- "Sed estas ja problemoj," diris Alice, "scii ĉu vi havas la raĵon doni tion da malsamaj signifoj al la vortoj."
- "La problemoj estas, scii kiu posedas la aŭtoritaton," diris Humpty Dumpty, "jen ĉio!"
(Lewis CARROL, *Alice en Mirigafolando*)



Lingvoj evoluas kune kun la gentoj kiuj ilin parolas, akceptante tra sia historio aliajn formojn kaj eĉ novajn regulojn. Ili ankaŭ, same kiel homoj, de generacio al generacio disbranĉigas en parencajn familiojn. Tial, ke tiu duobla procezo okazas relative malrapide kaj kutime apenaŭ perceptebla, estas malfacile determini ekzakte kiam oni havas aferon kun nova formo aŭ kun nova branĉo. La supre ellaborita skemo sekve ne povas ne esti iom arbitra. Tamen, la diferencoj inter vertikala kaj horizontala diskreskoj estas en praktiko sufiĉaj por ĝenerale interkonsentigi lingvikistojn. Evidente, pluaj malkovroj kaj studoj daŭre povas modifi detalojn en la skemo. Indus aldoni al ĝi miklingvojn kiaj estas: Jidiŝo el germana kaj hebrea, Ladino el hispana kaj hebrea, haitiana el franca kaj bantuaj, kaj tiel plu.

5. LINGVOFILOZOFIO

(Rilatoj inter penso, vorto, kaj objekto)

En la antaŭa ĉapitro mi provis argumenti favore al metapsika fono, servanta kiel bedo el kiu unufoje ekkreskis la lingvofloro(j). Sed estas rimarkinde, ke tiu sama hipotezo povas havigi senpere respondon ankaŭ al la ĉefdemandoj de lingvofilozofio en la sulko de KANT: kia estas la rilato inter vorto kaj (ekstera al ĝi) objekto; kia estas la rilato inter abstrakta penso kaj konkreta lingva esprimo; kaj ĉu entute la "ekstera" mondo ekzistas sendepende de ĝia reproduktiĝo en nia pensado?

Mi nun povas ja sen granda fortostreĉo starigi, ke la manasa energi-tavolo ludas esencan rolon en ambaŭ tiuj demandoj. Ĝia rolo do ne restu limigita al nura ekirigo de la fenomeno "lingvo", sed etendiĝas al tiu de konstanta kaj ne malhavebla nutrogrundo por la ekzisto kaj funkciado de lingvo.

Ekzistas, laŭ eĉ eksperimentaj esploroj, intima ligo inter unuflanke la "subjektiva tavolo" interna al la homa menso, kaj la "objektiva tavolo" per kiu ĝi manifestiĝas ekstere, ajne per kiuj terminoj/konceptoj oni volas tion envortigi: ĉu per *type* (tipo) kompare al *token* (signo), ĉu per *competence* (kompetento) kompare al *performance* (lerteco), ĉu per *signifié* (signifato) kompare al *signifiant* (signifanto), ĉu per pli da tiaj "ĉirkaŭiri la trovarman kuirpoton".

Male troveblas neniu firma pruvo pri simila ligo inter niaj pensoj kaj la objektoj (individuaj aŭ ĝeneralaj) al kiuj ili referencas en la mondo ĉirkaŭ ni. La senkompara lingvistino Marina YAGUELLO, en sia admirinda franclingva verko *Alice au pays du langage* [Éditions du Seuil, Paris, 1981], tion trafe esprimas, dirante: "Le mot *chien* n'aboie pas" ("La vorto *hundo* ne bojas"). Estas tial paradokso, ke "la ĝenerala publiko", ne scianta pri tiu science establita fakto, restas nepre kaj nepre konvinkita pri la senpera interŝanĝebla de la vortoj kaj objektoj, konkretaj aŭ abstraktaj, kiujn ili celas. Pri tiu miskoncepto probable kulpas la senĉesa ekzercado de la homa individuo, ekde la lulilo, nomi kaj rekoni objektojn, emociojn, agojn, situaciojn, en la vivoĉirkaŭaĵo, tiele ke iu vorto aŭ esprimo tuje produktas en nia cerbo iun "bildon" pri la celata afero, kaj inverse koncerna objekto tuje respondan vorton aŭ esprimon. Poste oni vastigas tiun mensan horizonton, enkapigante la sperton de aliaj homoj, precipe per studado kaj legado, ĝis kiam ankaŭ tempe kaj space malproksimaj realaĵoj integriĝas en oniajn pensadon kaj lingvon. Eble plej kerne ilustras tion, almenaŭ en socioj kun skriba kulturo,

la fakto ke oni nepre identigas (alfabetajn) literojn kaj (efektivajn) fonemojn, kiuj tamen preskaŭ neniam sin kovras plene. La franca lingvo posedas oficiale nur 5 vokalojn — pura iluzio — dum la fonetika realaĵo distingas 13 tiajn! Ja eĉ en nia "tute fonetika" Esperanto oni same opinias, ĉar ekzemple senvoĉa *c* estas rigardata kiel baza parolsono/simbolo, dum ĝia voĉhava komplemento *dz* estas rigardata kiel nur hazarda kombinaĵo. Kaj pro longa alkutimiĝo al legado/skribado oni ĝenerale taksas kombinaĵojn kiaj *kz*, *bs*, *kv*, kiel nepre kongruaj kun ties reala prononco, spite la veron.

Tiu psikolingvistika kondiĉigo de la homa cerbo fariĝas baldaŭ eĉ tiel dogma kaj despota, ke ĝi konsistigas preskaŭ ne supereblan obstaklon al sana konformigo de la ortografio al la efektive parolata formo, en lingvo kiu havas tre malnovan skribo-tradicion.²² Kuŝas do sufiĉe da vero en la aserto de B.L. WHORF²³, ke:

Ĉiu lingvo estas vasta sistemo de strukturoj, diferenca disde l'aliaj lingvoj, en kiu estas kulture ordigitaj la formoj kaj kategorioj per kiuj la individuo, ne nur komunikas, sed ankaŭ analizas la naturon, rimarkas aŭ neglektas tiun aŭ alian tipon de fenomenoj kaj rilatoj, en kiujn li verŝas sian propran rezonmanieron kaj per kiuj li starigas la konstruaĵon de sia sciaro pri la ĉirkaŭmondo. [...] Ni diserigas la naturon laŭ linioj strekitaj jam anticipe per niaj gepatraj lingvoj.


Estas pro tiu aferostato malfacilege transporti konceptojn el unu lingvo kaj kulturo en alian lingvon kaj kulturon. Tiun problemon daŭre alfrontas tradukistoj de la Biblio, la Korano, la Vedo, la Tao Tŝi, kotopo, spite la jam giganta sperto akumulita en praktiko kaj de la ĉiam pli firme ellaboritaj principoj en teorio. Ŝajne simpla nocio kia (absolutnatura) Dio (kristana) estas apenaŭ tradukebla, kun ĉiuj ĝiaj pens-asociigoj, en ekzemple budhismapanteisma homsocio; certe ne per nur unu tute ekvivalenta termino, ĉar en tiu granda kulturo ne ekzistas (aŭ ekzistis) la bezono por tia pensokadro.

Referencante al la ĉi-postaj skizoj, mi persone eksplikas la situacion kaj funkciadon inter "penŝaĵo" kaj "realaĵo" tiamaniere, ke:

- a) la rilataro en la manasa (subkonscia) tavolo estas tuja, senpera, kaj intermerga — ĉio estante intime ligita al ĉio cetera, sinkrone, diakrone, kaj parakrone;
- b) la rilataro en la fizika (kosma) tavolo estas ĉiam transira kaj pera, per iu ono de lumrapido (la universala konstanto), kaj do daŭre iranta de subjekto al objekto, de kaŭzo al efiko, de premo al konkludo;
- c) la rilataro inter subkonscio kaj konscio estas ankaŭ tute intima kaj senpera, sed (depost la Origina Ribelo) forte bremsata kaj vualita.

22: Kaj por adopto de Internacia ortografia sistemo, kia mia projekto pri *Universala Skribo*, eĉ multoble pli...

23: En *Language, Thought and Reality*, MIT, Cambridge, Mass., Usono 1956.



Kredeble nenio pli bone ilustras tiun dinamikon ol ĝuste la homa lingvo, kun siaj senĉesaj komunikado kaj transformado de mesaĝoj, inter psikaj elementoj interne kaj fizikaj elementoj ekstere, inter enigme "senvortaj" interkompreniĝoj de homoj, kaj purfizike inter la realigantoj de lingvokodaj mesaĝoj (ĉu homaj aŭ elektronikaj).

La vera intima ligo inter subjekto kaj objekto tiel, laŭ mia hipotezo, ekzistas (okazas) nur en la manasa tavolo, sed bedaŭrinde forte obstaklas kaj fuŝas tiun intiman kontakton — aŭ la konscian percepton de tiu kontakto — unue la konkretaj vivocirkonstancoj kaj vivobezonoj (kiuj malhelpas enmemigon) kaj due la ĵus demonstrita pensokondiĉigado fare de la kulturo/lingvo.

Tute strange oni povas do diri, ke la reala kontakto inter "subjekto" kaj "objekto" okazas en la metafizika sfero, dum ĝia paralelaĵo en la konkreta sfero estas kvazaŭ nur "ombro" — sed ombro ofte ne malpli forta kaj dolora! En tiu ĉi framo "mentalismo" kaj "fenomenologio" do agas komplemente unu al l'alia, ne eksklude.

Ni ankaŭ ne forgesu, ke bildoj antaŭiras vortojn, kaj estas multoble pli esprimplenaĵ, kiel trafe ilustras la evoluado de skriboformoj tra la jarmiloj: komencante per piktografio kaj nur laste per alfabeto prezento. Enfunde ankaŭ vorto estas nur bildo, nur plu ne sinteza sed jes analiza. Kiel jam demonstrite en la antaŭa ĉapitro, inspiroj kaj intuicioj okazas/situigas ĝuste en la manasa sfero, kie ili konsistigas fortan kuntrafon inter la perceptanta individuo kaj la perceptata entito, kiu povas esti tute simple subita (super-tempa) akordiĝo inter la logiko-strukturo de la homa perceptanto kaj la logiko-strukturo ekzistanta en la "natura" ekster ĝi. Nia subkonscio feliĉe foje — en decidaj momentoj — kapablas tratreĉi la muron starigitan kune de materiaj cirkonstancoj kaj de la reganta kultura mondbildo.

Tamen, ni neniam scipovos — eĉ prenante en konsideron la manasan sferon kaj ties tute propran fenomenaron kaj leĝaron — neniam scipovos **ĝisfunde kaj ekzakte** kompreni kaj determini tiun strangan dis-econ/kun-econ regantan en nia Universo. Kial ne? Tial ke ĝi estas finfine iu artefarita situacio, kiu devus ne ekzistipovi, se konsideri ke ĝi estas tute relativnatura emanaĵo de absolutnatura Dio. Al la demando, kiamaniere absoluta perfekteco povas

estigi mankoplenan relativecon, kapablos respondi nur tiu kiu vidos Dion en Ĝia pleneo. Vidante grandan pentraĵon, oni povas sen malfacilo kompreni la signifon kaj lokon de iu ĝia detalo. Sed vidante nur iun detalon, oni ne povas rekonstrui aŭ kompreni la tutan pentraĵon. Tio, kio restas farebla, estas: kompili plejble multajn detalojn kaj serĉi kiamaniere tiuj pecoj de la grandioza puzlo estas interkonektitaj. Lingvofilozofiô en tiu perspektivo sekve neniam sukcesos respondi al sia ĉefa kaj centra demando pri la **kio** de la pritraktitaj rilatoj. Ankaŭ ne religiaj doktrinoj, kvankam tiuj jes kapablas respondi al la ankoraŭ pli grava demando "kial?"

* * * * *

Per tiu ĉi aparta ekskurso, kiu kondukis nin en la regionojn de filozofio kaj teologio, mi probable ankoraŭ ne elĉerpis ĉiujn fenomenojn de la homa lingvo, sed la tuta ekspedicio jes — mi esperas — havigis la bezonan kadron ĝeneralan por povi ĉion gravan kaj esencan firme situigi kaj interrilatigi en lingvistiko. Pli kleraj aŭ penetremaj fakuloj fajlu kaj kompletigu miajn filistrajn tezojn, tiele ke lingvistiko fariĝu finfine vere scienca teorio anstataŭ nur kolekto de hipotezoj. Postaj ĉapitroj konsistigas praktikan kontribuon por tiu celo.

Alia problemo de la lingvo [Esperanto] estas, ke niaj lernolibroj kaj gramatikoj, nenion lerninte el la progresoj de la lingvistiko dum la lastaj 50 jaroj, traktas nian lingvon per eŭropaj terminoj kaj konceptoj, kiuj estas tute fremdaj, ne nur al aziaj lingvoj, sed ankaŭ al Esperanto mem. [...] Necesus restudi, "perestrojki", la gramatikon de la lingvo en pli simpla kaj versimila maniero.

(Geoffrey King en *La Espero el Koreio*, Majo 1990)

6. KIAL NOVA NOMENKLATURO POR LINGVISTIKO?

6.1 Pravigo de Terminologia Reformo

Plejparto el sciencaj disciplinoj — eble ĉiuj — kreskis kaj kreskas per tn. "natura evoluo". Novaj elementoj, novaj fenomenoj, novaj interrilatoj, estas kaŭzo kaj fundo de daŭra akumulado de scioj, tiel kiel kaj tiam kiam ili ekaperas. Tiujn oni enmetas en koncernajn "tirkestojn" de la koncerna "fakŝranko", kiom eble plej orde.

Sed de tempo al tempo sin trudas bezono rekonsideri kaj reverki la tutan konceptaron en la kadro de iu pli vasta perspektivo, laŭ la perceptomaniero de nova tn. "paradigmo". Tiel ekzemple la sufiĉe ĥaosa ordigado de elementaj substancoj, ekde Eŭropa Antikveco, ricevis fortegan impulson, post kiam MENDELEJEF proponis sian faman tabelon.

Bedaŭrinde, se fakuloj ja sukcesas pli-malpli taŭge readapti la hierarĥian sistemon de sia **nociaro** al nova malkovro aŭ al nova teorio tuŝanta la fundamentojn, ili apenaŭ sukcesas — eĉ apenaŭ provas — adapti ankaŭ la **nomojn**, tradicie jam atribuitajn al tiuj nocioj. Ne nur kiom koncernas la nociojn individue, sed ankoraŭ multe malpli koncerne al ilia arbostruktura disbranĉigado, alidire taksonomio.

Se do iu nociosistemo **okaze** akiras tute klaran interrilatigitecon, kaj estas tiam prezentbla per "organigramo", tio certe ne aplikatas al la nomoj mem, al la pri-fakaj terminoj en donita genta lingvo. La jugo de tradicio, de jardekujn longa kaj foje eĉ jarcentojn aĝa lingvouzado, evidente ne permesas kaj ne toleras tian plancelan adapton al la progreso. La "natura evoluo" ja vidigas iom post iom anstataŭigon de populara vorto per tute specialisma termino — ekzemple de *sukermalsano* per *diabeto* — laŭ progreso de la ĝenerala popola kleriĝo.

Simile, ŝanĝiĝo de la "mensostato" (moralaj normoj) emas anstataŭigi iun tute klaran (sed pro sia realeco ŝokan) esprimon per iu pli "neŭtre" kaŝema — kiel ekzemple iu (hontinda) *seksmalsano* per *sekse transdonebla aflikto*, kiu perdas sian terurecon eĉ pli per la — hodiaŭ pululanta — kutimo ĉion diri per ne tuje kompreneblaj siglonimoj, ĉi-kaze STA, aŭ eĉ per "amuzaj" sed fakte fiaj ĵargonizmoj. Sed tiaj "metodoj" kontribuas sole al ankoraŭ pli forta ĥaoseco kaj opakeco en la terminfarado, tute malinda je racia kaj orda pensado kaj tute malprofita por efika komunikado sur internacia nivelo. La paraleleco de tio kun la, al esperantistoj bonkonata, konflikto inter (relative) ĥaosaj naturaj lingvoj kaj (relative) ordoplenaj planlingvoj, estas tre trafa.

Ankaŭ Esperanto mem — en sia "fundamenta" formo tradicia tiel aplombe proklamata kiel "facila" kaj "klara" komunikilo por la tuta mondo — ofertas ĉi-

koncerne nenium avantaĝon, ĉar ĝi ja neniel provas (plu)konstrui sur la logika bazo, konceptita de la Majstro. Per daŭra kaj absolute senkritika adoptado, de la en naciaj lingvoj regantaj tradicioj, ĝi ja nur transprenas ilian malregulecon. Eĉ plie! Tra la fifama «Dekkvina Regulo», ĝi kripligas ĉiun travideblecon kiu okaze ankoraŭ percepteblis en la originaj vortoj. Ekzemple la termino *ekstrapolado*, kiun latinidaj lingvanoj ankoraŭ komprenus, nenion ajn diras al Japanoj aŭ Araboj, ĉar tiuj ĉi ne povas fidi je la kutima Esperanto-vortaro, escepte de *-ad-*, por ekkoni la konsiston de tiu vorto kaj do kompreni ĝin senpere. Same estus pri *cirkonferenco*, *metabolismo*, *kompilero*, *pluskvamperfekto*, kaj multaj multaj aliaj similspecaj terminoj tradiciaj. Oni devas tiujn multegajn elementojn entute parkeri, kvazaŭ ili estus propraj nomoj. Kien do migris la bela idealo de ZAMENHOF?

Neniel mirige, ke Esperanto ne povas allogi fakulojn same kiel ĝi allogas idealistojn. Ili trovas nenion en ĝi, kion ili ne jam trovis en sia gepatra lingvo aŭ — ve! — en la superreganta angla lingvo...

Do, se Esperanto vere deziras enpenetri tiun — en nia kaj estonteca epokoj absolute decidan — medion, kaj tiel efektive atingi la alsopiratan "finan venkon", ĝi devas **komplete** reorganizi sin mem kaj agi nepre sendepende! Aktuale nek la "interna ideo" de individuaj homaj interkomprenoj, nek tiu de beletrisma verkado — kiel ajn laŭdindaj kaj admirindaj — sufiĉas por trabreĉi la "obstinajn barojn" de nude kaj krude materialisma mondo teknologia, ĉar ili daŭre moviĝas en tiu rigida Eŭropa Tradicio.

Nur se ni sukcesos oferti al la sciencoteknika fakularo ion kion ili **ne** trovas en naciaj lingvoj, antaŭ ĉio ne en la angla, nur tiam ni povos esperi atingi nian celon: vere tutmonde aplikata lingvo internacia, en ĉiuj tavoloj de la homa socio, en la ĉiutaga konkreta vivo, anstataŭ nur en la rondo de klubejoj, de verdaj asocioj, de efemeraj kongresoj.

Se ĝi ne faros tion, ĝi povos nur elrevigi freŝajn varbitojn kiuj post kelka tempo ree malaperos, kaj eĉ multajn homojn, kiuj dum la tuta vivo dediĉis sin al la Movado, ĉar efektiva rezulto konkrete forrestas.

Sufiĉas trafoliumi malnovajn jarkolektojn de niaj periodaĵoj, por mire konstati kiom da "novaj" iniciatoj kaj "novaj" atingaĵoj jam aperis kaj malaperis antaŭe, por esti ree kaj ree provataj, sen lasi palpeblan spuron. Ni eĉ devigatas ĉagrene konstati kaj agnoski, ke nia Movado daŭre **mal**progresas, kompare al la eksplode kreskanta monda loĝantaro kaj la furore ekspansianta usonangla lingvozono.

Post plena jarcento da (finfine vana) esperantista agado, estas do urĝa tempo ĝisfunde rekonsideri kaj replani nian "karan lingvon". *To be or not to be*, kiel diris SHAKESPEARE...

En tiu perspektivo mi do proponas la trabraĉan projekton **Universala Esperanto** kaj speciale ties «Terminologian Ŝlosilon». ²⁴

Tiu ĉi projekto, kvankam ĝi ankoraŭ esence prenas apogon sur zamenhafa Esperanto — sen kiu ĝi ne kapablus ekzisti — ofertas la unikan okazon rekonsideri kaj reverki ĉiujn **nomsistemojn** (nomenklatureojn) de ĉiuj sciencaj disciplinoj, liberigante ilin de la superpezo de tiu sufoka eŭropisma Tradicio!

Kiel ekzemplon kaj modelon de tia ĝisfunda remuldo, mi elektis speciale lingvistikon, ĉar ĝuste tiu estas inter ĉiuj sciencoj eble la plej konfuza, kaj rilate al terminaro kaj rilate al konceptaro. Ĝi ja naskiĝis jam en la Eŭropa Mezepoko, en kaj el la sino de Latino, tra la jarcentoj neniam sukcesante aŭ eĉ provante liberigi sin de la katenoj, kiuj ligas ĝin al tiu antikva lulilo. Se la remuldo sukcesos je tiu elstare vepreja disciplino, ĝi povas esperi sukceson je ĉiuj ceteraj disciplinoj, kaj tra tiu ebleco **efektivan** interesiĝon flanke de la sciencista mondo.

Ni rekonsideru tion iom pli detale.

6.2 Kiun lingvon uzi por scienca terminografio?

Kiel bonkonate en la medio de modernaj lingvofakuloj, estas nepre malĝuste kaj maljuste preni la strukturon de tiu aŭ alia lingvo — de la propra lingvo! — kiel kriterion por studi aŭ pritaksi la valoron de aliaj lingvoj. La metodeco de ĉiu (genta) lingvo ja estas ideale adaptita al esprimado de la koncernaj kulturo kaj la vivobezonoj, sed ne de aliaj. La fakto, ke en ĝi eventuale "mankas" iu esprimada rimedo, ja uzata de "granda" lingvo, ne validas kiel normo por pesi ĝiajn kvalitojn. Tio estas nur antaŭjuĝo kaj nepre subjektiva interpreto.

Male kaj inverse: kutime ekzistas en ĝi iu speciala leksika aŭ gramatika propraĵo, same ne trovebla aŭ ne sammodele rekreebla en alia(j) lingvo(j). Ekz. en Svahilo ekzistas ok klasoj de substantivo, kie "gravaj" lingvoj distingas nur tri: vira, ina, neŭtra. Kaj oni raportas pri Bantu-lingvoj kun ĝis 26 da tiaj klasoj!

Sendube oni renkontas kompare pli aŭ malpli evoluintajn homajn **sociojn**, sed ne niu esploristo ĝis nun kapablis pruvi — nur aserti — ke ties **lingvoj** staras sur malpli forta esprimada nivelo ol ekz. eŭropaj lingvoj klasikaj. Ĉiu lingvo, kiel diri rite, taŭgas por la propra kulturmedio, ĉar ja ĝuste tio — kaj nur tio — estas ĝia tasko. Kontraŭe, oni konstatas, ke "primitivaj" lingvoj kutime estas pli komplekse strukturitaj ol "civilizitaj" lingvoj, kiel demonstros la supra ekzemplo. Kaj evoluo kondukas — pro la "ekonomia principo" (plejeble multe perplej-

24: Ambaŭ prezentitaj en «Lingvonormiga Reformo de Esperanto» [Eldonejo ESPERANTO PRESS, Bailieboro, Ontario, Kanado], kvankam tie temas nur pri ĝia unua (labor)versio el 1987.

eble malmulte) — al daŭre pli simplaj formoj en la "spacaj" aksoj; je kosto kompreneble de la "tempa" akso. Antaŭ multaj jarcentoj la angla havis same multe da deklinaciaj kaj konjugaciaj formoj kaj finaĵoj kiel la germana.

Estas cetere pro tiu natura leĝo, ke mi ellaboris la projekton *Arkaika Esperanto*, igante nian "hodiaŭan" lingvon metode pli komplikita, kaj la projekton *Popido* ("la verda dialekto") male pli simpla; ambaŭ por plenigi la koncernajn vakajn lokojn en la esprimebleco de nia Lingvo Internacia.

Ankaŭ la karakterizoj "pli simpla" kaj "pli kompleksa" cetere estas tute relativaj. Tio, kion oni forprenas de unu el la kosmaj aksoj [ĉap. 2.5], devas kiel dirite iel trovi kompenson en la aliaj. Ekzemple, forigado de fleksiaj finaĵoj el la angla kaj el la klasika ĉina kondukis en tiuj lingvoj fine al amasego da homonimoj kaj ambiguecoj, t.e. al kreskego de la semantika akso. Mi do ripetas, ke plej ideala lingvo estas tiu en kiu ĉiu kontrasta akso staras en bona ekvilibro kun la ceteraj du; jen objektiva kriterio, sed ankoraŭ kvantiginda kaj kalkulinda.

Unu afero tamen estas jam nombre demonstrebla (per procentaĵoj), nome la facileco kaj efikeco per kiuj iu lingvo estas **lernebla**. En tiu rilato, kiel konate kaj kiel science pruvite de Profesoro H. FRANK, nepre elstaras nia Lingvo Internacia, kvankam ankaŭ tiu ĝia kvalito forte dependas de la gepatralingva ekirbazo. Por Araboj estas ekstra obstaklo kutimiĝi al latinaj literoj kaj al legado de maldekstre dekstren. Por Japanoj estas ekstra obstaklo kutimiĝi al la eŭrop-norma vortordo en frazoj kaj al kombinaĵoj de konsonantoj.

En ĉiuj tiuj rilatoj estas do apenaŭ pravigebla, ke Esperanto aliru la gentajn lingvojn tra la mondo, kun ties multaj familiaj disbranĉigoj, per lingvistika **nomenklatur**o intime devena de kaj specife adaptita al la mortaj kulturlingvoj de Eŭropo: la greka kaj latina. Kia maljuste privilegia pozicio por tiuj ĉi lastaj! Kaj kia tasko por lingvosciencistoj ne-eŭropaj, ekregi tiun terminologion, eĉ se nur pasive!

Sola maniero por rektigi tiun torditan situacion, sur neŭtrala kaj universala bazo, estas: unue aranĝi ĉiujn koncernajn nociojn laŭ ilia interna hierarkia ordo kaj poste havigi al tiuj nocioj nomojn (terminojn), kiuj plejeble senpere vidigu al la uzantoj — ajne kiu estu ilia genta aparteno — kion la terminoj celas kaj kie ili situas en la nociara sistemo de lingvistiko. La latina aŭ la greka lingvo tiele plu ne servu kiel absoluta bazo por trakti/studi aliajn lingvojn — aŭ eĉ nur Esperanton mem! — kion ili neeviteble ankoraŭ ĉiam faras aktuale, tra sia kompleksega kaj senorda nomenklatur klasika. Sed ili mem fariĝu, kiel decas kaj justas, studobjektoj analizataj per nepre universala kaj neŭtrala terminaro, t.e. logike-skemisme konceptita. Anstataŭ ilin, aŭ pli ĝuste sur ili kiel sur fundamento, mi tial kompilis sisteme strukturitan **Terminologian Ŝlosilon** kun akompana regularo, organe integritan en Esperanto. Ĝi servu kiel universale aplikebla fundamento por terminfarado en sciencoj kaj teknikoj, la granda postrestinta malforto de tradicia Esperanto.

En la praktiko, tio kuntrenas por Esperanto tri principojn, laŭ kiuj reorganizi en PIV la signifojn kaj respondajn terminojn:

1. Disigi verajn homonimojn, kiuj ne konsidereblas kiel polisemantoj:

<i>kanono (1)</i>	= "pafilego"	→ <i>kanono</i>
<i>kanono (2a)</i>	= "eklezia regulo"	→ <i>ĥanono</i>
<i>kanono (2b)</i>	= "eklezia katalogo"	→ <i>ĥanonalo (1)</i>
<i>kanono (2c)</i>	= "eklezia preĝoformulo"	→ <i>ĥanonalo (2)</i>
<i>kanono (3)</i>	= "ĉenkanto"	→ <i>ĥanuno</i>

2. Grupigi parencajn konceptojn prefere sub komuna radiko kaj nur dua- instance atribui individuan terminon, ĉu per:

- a) kunmetaĵo:

Dio-de-la-Hebreoj, Dio-de-la-Helenoj, Dio-de-la-Islamanoj ...
(hebrea, helena, islama Dio ...)

- b) derivaĵo

instrukci, instrukco, instrukcisto
[instrukcii, direktivo, instruktoro]

3. Forigi hazarde adoptitajn sinonimojn:

gaskono → fanfaronulo	minca → gracila	detempro → tempro
korekte ≠ ĝuste	certa ≠ iu	korespondi ≠ respondi

Precize tiujn principojn mi aplikas en tiu ĉi verko al la terminaro de lingvistiko, grandaparte kun helpo de la vort-elementoj kaj kombinreguloj el mia ĵus citita «Terminologia Ŝlosilo», kiu strebas realigi la revon de Eugen WÜSTER. Mia propono tial iomete pensigas pri la drasta elpaŝo de la sveda botanikisto LINNÆUS, kiu en 1735 arbitre kreis novan ordon en la ĝistiam konfuza abundo de nomoj por plantoj kaj bestoj, anstataŭigante tradicion per racio. Ĉu tia reformo ankoraŭ eblos en nia propra epoko, tio estas kompreneble alia demando. Nu, se la homoj ĝin ne ŝatos, eble la maŝinoj ĝin frandos...

6.3 La Nomenklature de Lingvistiko kiel Test-Kazo

La tradicia terminaro de lingvistiko — precipe tiu de gramatiko — estas en tiu perspektivo, laŭ mi, la tutunua fortreso kiun ni devas ataki kaj venki, se ni vere deziras liberigi Esperanton de ĝiaj kaprice eŭropismaj katenoj: tiom pro ĝia centra rolo en ĉiu lingvokomunikado (instruado de Esperanto al ne-hindeŭropidaj popoloj!), kiom pro ĝia escepte forta greklatina kiraso. Ja, se tiu timiga fortreso falos, ĉiuj ceteraj terminologiaj fortresoj en la sciencista mondo estos kompare nur kartonaj kasteloj — kun ebla escepto de la komputorika bastiono. Sed tio dependos malpli de la, en tiu ĉi verketo eksponata, revolucia metodo mem, ol de nia mensa preteco forskui nian jam centjaran tradicion.

hazarde estiĝintan pro tiu misbakita 15^a Regulo de la Fundamento. Se kredi je D-ro Arthur BAUR en *La Espero el Korelo*, numero 86 (1988), estus absolute vane esperi ŝanĝiĝon en tiu sinteno, ĉar: "La tradicio ludas en nia lingvo hodiaŭ jam la plej grandan rolon, kaj oni nur malsukcesas, se oni volas aldevigi al ĝi iujn teoriojn kaj skemojn." Tiel senespere sombran enkarcerigon de Esperanto mi ne povas akcepti; plivole mi lasu la eblecon pri resaniga miraklo malferma, kaj rezonu kvazaŭ niaj vortaristoj ankoraŭ ne definitive submetiĝis al tiu despota tradicio. Ĉiu terminologo devus nepre ekkonscii, ke neniel sufiĉas inventi kaj aldoni pli kaj pli da terminoj al la jama "trezoro", laŭ kapricoj de la vento, sed ke sole kaj nure **metodeca** kreado (kaj reformo!) de la bezonaj terminaroj en ĉiuj fakoj kapablos alfronti la teruran inform-eksplosion de nia aktuala epoko, kaj suprenlevi Esperanton de la mizera lastvica loko, en kiu ĝi persistas koncerne scienco-teknikan komunikadon.

Metodeco siaflanke atingeblas nur per racia (re)enordigo de la koncernaj konceptoj kaj terminoj kiel urĝe **tutunua tasko**. En tiu perspektivo la kara *Plena Ilustrita Vortaro* estas kapturene konfuza staplejo; staplejo en kiu oni ja akumulis ĉiujn eblajn nociojn en la formo per kiu ili aperas nacilingve. (Esceptoj konfirmas la regulon.) En ĝi tial **kune** akumuliĝis preskaŭ ĉiuj ambiguecoj kiuj antaŭe ekzistis nur en ĉiu lingvo **aparte!** Ĉi-sekve unu ekzemplo el centoj pri tiu konfuzo, trudita al PIV de ĝiaj franclingvaj kompilintoj: Se fidi je nia PIV, mi ja rajtus diri: "La *korsaro* (2) ordonis al la *korsaro* (3) tuj forlasi la *korsaron* (1)" Kristalklare, ĉu?

Niaj terminfaristoj en ĉiuj fakoj tial tre serioze atentu la gravan averton de Profesoro H. FELBER, la estinta direktoro de INFOTERM, en prezenta broŝuro pri tiu fondaĵo:

Starigon de la projekto TermNet nepre necesigis la kriza situacio en faksciencaj komunikado, dokumentado, kaj informado, kaj ĝia antaŭvidebla plikompleksiĝo en la estonteco. La rapida kresko de konceptoj, en ĉiuj kampoj de la homa agado, kaŭzas gravajn komunikadajn problemojn. Ĉiuj ĉi konceptoj devas esti reprezentataj per terminoj el individuaj lingvoj, kiuj havas [nur] limigitan provizon da vortoj kaj da vort-elementoj por terminfarado. Pro tiu ĉi **forta misproporcio inter konceptoj kaj vortoprovizio** — vortradikoj kaj afiksoj en individuaj lingvoj nombras ĝis kelkaj miloj, [dum] la konceptoj en apartaj fakterenoj atingas milionojn — fariĝos pli kaj pli malfacile komunikadi senambiguece. Tiu ĉi malfavora rilatumo povus estigi eĉ situacion en kiu la komunikado de homo-al-homo, de homo-al-maŝino, kaj maŝino-al-maŝino, iom post iom devus ĉesi. Plue, la transiro de [nure kompiladaj] datenbazoj al [semantike organizitaj] sciobazoj, postulos novan orientiĝon ankaŭ en informado, kiu utiligos **sistemajn** terminarojn.

[La emfazojn faris mi.]

Semantika organizado de la konceptoj venu do absolute unuavice. Atribuado de taŭgaj terminoj estas duavica zorgo, kaj triavica zorgo — jam bonkonsciata en la koncernaj industriaj komisionoj — estas la normigado de konkretaj produktoj kaj servoj. Cetere, ankaŭ Sinjorino Wera DEHLER, sekretario de nia Terminologia Sekcio de UEA, firme opinias ke:

Ĉiu terminografia laboro eliru de la nocioj. La nociojn oni difinu tiel ke ili formu koheran sistemon. **Terminoj de iu fako ne ekzistas izolite**, sed rilatas al aliaj terminoj de la sama fako, de aliaj fakoj, kaj de la generala lingvo. Ĉiuj terminoj de unu fako prezentas sistemon, sur kies strukturo baziĝas ĉiu faklingva normigado. Pro tio **normterminoj nepre estu sisteme aranĝitaj**, t.e. laŭ klasifiko de nocioj.

(*Der Esperantist*, n-ro 132 (1965) — substrekoj estas miaj)

Bonege, sed se la terminoj, aljuĝataj post tiu antaŭprepara sistemigo de nocioj, montras en sia ekstera formo nek iun "travideblecon" nek iun parencecon kun membroj de la sama klaso, tiam la tuta antaŭprepara laboro estos vana kaj perdita **en la apliko**, alidire ne spegulos la "genealogion" de siaj nocioj!

Nu, ĝuste tiel statas en la ekzistanta terminaro de lingvistiko, kiu jes spegulas la flaoŝecon de tradicia estiĝo, sed ne la ordon de hierarkie strukturita nociaro. Ekzemple, la termino *sinekdoko* per si mem neniel indikas ĉu ĝi estas gramatikaĵo aŭ aforismo aŭ stilfiguro aŭ fonetikaĵo aŭ vortotipo aŭ eĉ iu bakterio aŭ malsano aŭ maŝinparto. Krome, eĉ sciante ke temas pri stilfiguro, neniu esperantisto kapablas senplie kompreni ke *silepso*, *litoto*, *tropo* estas parencoj de ĝi. Kompare, terminoj kiaj *antifrazo*, *apiokopo*, *prozopopeo*, *paronomazio* havas la avantaĝon — **almenaŭ ielele** — indiki al kiu klaso ili apartenas. La elekto kaj selekto de terminoj devas sekve esti farata plejeble konforme al la tiel pene organizita nociara disbranĉiĝo, kaj ne necese konforme al (nur) la tradicio en gentaj lingvoj! Estas la jam malnova apriora lingvoplano en nova vesto kaj aplikota al fakscienca(j) nomenklatur(oj). Pleje profitus el tiu raciigo la Artefarita Inteligenteco en komputoriko, per multe pli efike (= klare) aranĝitaj sciobankoj. Tio, kion termino mem indikas, plu ne devos esti serĉata en la arĥivoj. Kial do ne tuje apliki ĝin al Esperanto, ekzemple en ĝia rolo de pontlingvo por permaŝina tradukado?

Lingvokreo estas des pli vigla, ju pli ekzakte procedas la normigo de nocioj, aŭ ju malpli ellaborita estis la teknika lingvaĵo antaŭ la normigo.

(Eugen WUSTER)

6.4 Postkonsideroj

En fundo la projekto pri Universala Esperanto estas iu revivigo de la idealo de "filozofia lingvo", kiu tiel intense okupis sciencistojn ĉirkaŭ la 17^a jarcento en Eŭropo — inter kiuj DESCARTES, LEIBNIZ, BACON — pro ilia strebado al plej-eble perfekta internacia ilo por komunikado inter intelektuloj, kaj kiu estu pli taŭga ol iu ajn konata naturlingvo, ĉar ja tute racie ellaborita.

Granda diferenco tamen kuŝas en la hodiaŭa ekkono, ke por tia speciala celo devas temi pri socikultura "supra tavolo" de la homa lingvo, kiu ja liveru la vort-materialon bezonatan de fakuloj, sed ne konsistigu efektivan lingvon en si mem. Ĉiel ajn ĝi devas preni apogon sur tia kompleta sistemo, por povi ekzisti kaj funkcii en la dezirata kadro. Miaopinie, estis malatento por tiu aferostato, kiu misgvidis nian grandan terminologon Eugen WÜSTER, barante al li la vojon al efektiva kaj definitiva solvo de la problemego.

Ankaŭ rilate al la koncerna fakula vortmaterialo, iu tute apriora koncepto — kiel tion proponas filozofiaj projektoj — ne povas havigi esperon pri sukceso, ĉar la saltego, kiun ĝi postulas de la alcelata elita medio, estus nesupereble granda. Kontraŭe, la uzontoj en tiu medio devas havi la eblecon kiel eble plej facile re-apogiĝi sur sia jam konata kaj familiara scienca lingvofundamento; pli specife sur la tezaŭro de greklatinaj vortradikoj, uzata jam de jarcentoj trans ĉiuj landlimoj de Eŭropo kaj, pere de koloniismaj lingvoj, eĉ en la aliaj kontinentoj.

Pro tiu stato de la problemo, mi metode ĉerpadis la materialon de mia Terminologia Ŝlosilo el tiu ĉi internacia scienca tezaŭro, laŭ la "aposteriora" maniero montrita de ZAMENHOF, kaj mi ege klopodis lasi tiun tuj rekonebla — kiomeble la bezonata raciigo tion permesis. Eĉ se konsideri (kun bedaŭro) ke la sperteco kaj lerteco en la uzado de tiu antikva kulturstoko, ĉe la sciencistaro de nia jarcento, falis preskaŭ ĝis frostopunkto; ne lastrange ĉar la tutaj esplorado kaj progres-igado de sciencoj kaj teknikoj fine estas koncentriĝinta en la anglalingvaj manoj de Usono, kun ties supera politika kaj ekonomia superpotenco.

Esperantista leganto, bonvolu do nepre kompreni, ke mi **ne** petas ellernadon de nova **planlingvo**, sed ja "nur" de nova **terminologio**! Jen tute granda kaj grava distingo kun antaŭaj rivalaj projektoj kaj ties missekvoj.

Tamen, tiu ĉi aŭtoro ne (absolute) kredas, ke sufiĉos per si mem aldoni eĉ plej efikan superstrukturon al la tradicia Esperanto, uzindan kaj uzotan de fakuloj, ĉiu en sia propra sfero. Eĉ se ĝi per tiu aldono nete superus iun ajn alian lingvon.

Pri la "fina venko" ja ne decidus ekskluzive lingvaj konsideroj. (Alimaniere nia idealo jam delonge estus konkerinta la mondon.) Decidas ĉefe eksterlingvaj faktoroj, kiaj Mondekonomio kaj Mondopolitiko. Kaj tiuj klare, kaj spite ĉiujn kontraŭstarojn de naciismaj interesoj, koncentriĝas hodiaŭ en potencocentroj regataj de la angla lingvo, ĉiutage pli.

La sola faktoro je kiu mi jes (vere) esperas, estas religinata movado, kies entuziasmo povus lanĉi la nepre necesan revolucion en la ĝenerala defetisma mensostato! Demonstro, pri tiu principa ebleco, estas la daŭre kreskanta fanatismo de islamaj landoj favore al influo de la araba, komprenata kiel "sankta lingvo" por la tuta mondo. Kaj mi uzas la vortojn "entuziasmo" kaj "fanatismo" tute intence, ĉar la unua estas esence konstruema dum la dua esence detruema.

Jen la kroma motivo, pro kiu mi tiel senĝene kaj holisme pritraktis ankaŭ metafizikajn kaj eĉ teologiajn aspektojn en lingvistiko — ĝis nun tute nekutimajn, se ne diri tabuajn en tiu kadro...

La mankoj de Esperanto kiel scienca lingvo estas tute aliaj ol tiuj de [naturlingvoj kia] la franca. En tiu [natur]lingvo oni renkontas senpovon kaj nekapablon sin adapti; en Esperanto nur nesufiĉecon korekteblan. En [natur]lingvo ekzistas la rompebleco de maljuneco; en Esperanto la nesufiĉeco de juneco. Ĝia malforteco estas do tute alia; ĝi estas kuracebla. Sed por ke tiuj adaptoj okazu, Esperanto devus funkcii kiel lokomotivo en la [ĝenerala] lingvo-evoluo kaj ne resti la lasta vagono, kiu nur obeeme sekvas, nur imitas tion kion la aliaj misfaris.

[Georges Lagrange en prelego por la SAT-kongreso 1968 en Bruselo]